

Turka Stelo



SALUTON,

Jen la junia 78-a numero de nia Turka Stelo revuo.

La vivo pasas tre rapide. Ni alproksimiĝas al la mezo de la jaro. Post preskaŭ du jaroj nun oni pridiskutas, ke la kovim-19 pandemio jam pasis kaj la viruso fariĝas endemia. Tamen estas novaĵoj, ke Norda Koreio nuntempe troviĝas senvakcina kaj senhelpa kontraŭ kovim-19 kaj devas esti grandaj kvantoj da malsanuloj en la lando kvankam ne estas datumoj pri tiu lando. Antaŭ kelkaj monatoj la kvanto de malsanuloj furoris en Suda Koreio sed nun la situacio estas sufiĉe trankvila. Nun en Turkio la nombroj komencis iomete grandiĝi.

Kaj ankaŭ aŭdiĝas la paŝoj de iam konata sed por ni nova viruso nomita "simia variolo", kiu laŭdire ne estas tiom furora, kiel kovim-19.

En nia kovrilo estas bildo de la filmo "Ĉaroj de Fajro" (brita filmo el la jaro 1981 direktita de Hugh Hudson, kies muzikon komponis Vangelis, la fama konata muzikkomponisto, ĉefe de filmoj, kiu kun tiu filmo tiam ricevis la premion de Oscar-o. Vangelis bedaŭrinde mortis en majo en Francio.

zorgas pri ĝi. Antaŭ kelkaj semajnoj okazis batalo sur la serpenta insulo, vi povas legi rakonton pri tiu insulo el la antikaj tempoj.

Nia amiko Pomo Tuffah subtitoligis esperante la malnovan sed tre faman filmon "Zorba la Greko" kies ligilon vi trovos en paĝo 2.

La dua ĉapitro de la romano "Mia Nomo estas Ruĝo" de la nobelpremiita verkisto Orhan Pamuk troviĝas en paĝo 6.

Krom tiuj estas multaj aliaj rakontoj kaj tekstoj en la junia numero de nia revuo kaj ĉiu trovos ion por si mem legi...

Bonan legadon al ĉiuj !

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Forpasis Vangelis	2
Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Malnova fama filmo nun kun esperantaj subtitoloj	4
Tempo Sigelita	5
Mia nomo estas Ruĝo (parto 2)	6
La aventuroj de Glano en la Lando de... (14)	8
La karaktero	11
Bildoj el la historio de la Esperanta Literaturo	12
Kataj historioj	13
Danco de fiŝoj	14
El la literaturaj paĝoj de MAS	14
Graveco de la sociologio	16
Misteroj - Elpensita aŭ vera? (8)	17
La Polino - parto 8	18
Georga Kruco	19
Facilaj artikoloj el UEA.FACILA.ORG retejo	21
Psikaj Pensoj	22
Danke al Vi	22
Ŝercoj	23
Krucvortenigmo	23
Unua Legolibro - parto 3	24
EKRA2021 - Poezio - Citruso	25
EKRA2021 - Poezio - Pasero	25
Felix Romuliana	26
La sakramento de la komunio	27
Miaj Hundo kaj Kato	28
Pri la serpento-insulo	29
Tera Vordonisi	31
Solvo de la krucvortenigmo	31
Facilaj rakontoj	32


Kursoj



Ĉe Burdur Mehmet Âkif Ersoy Universitato okazas Esperanto-lingvokurso nome "Esperanto Dili" kiel oficiala registrita universitata kurso elektebla de studentoj el diversaj fakultatoj. La kurson gvidas la univiersitata matematika instruisto Utku Gürdal. Al la kurso aliĝis 15 studentoj.
<https://edukado.net/kursejo?kid=27360>

Forpasis VANGELIS

Vangelis, propranome *Evangelos Odysseas Papathanassiou* (29/03/1943-17/05/2022), estis fama instrumentisto kaj muzika komponisto de greka deveno. Li apartenas al la pioniroj de la elektronika popmuziko, sed lia kreado intervenas en pli da muzikaj stiloj.



Komence de la 60-aj jaroj Vangelis estis ano de la greka muzika grupo The Forminx. En 1968 li iris al Parizo, kie li fondis kune kun *Demis Roussos* kaj *Loukas Sideras*, siaj samlandanoj, la grupon **Aphrodite's Child**, kies kreado portis sin en signo de progresiva rokmuziko. En 1972 la grupo disfalis, sed Vangelis ankaŭ pli poste kunlaboris kun Roussos.

Vangelis komencis sian solokarieron per kompono de muziko por filmoj reĝisoritaj de *Frederic Rossif*. Li alligis ankaŭ mallarĝajn kontaktojn kun kantisto *Jon Anderson* (el la muzika grupo Yes).

Vangelis poste transŝoviĝis en Londonon, kie li fondis propran surdiskigan studion *Nemo*. En 1975 li surdiskigis ĉi tie sian unuan konatan albumon *Heaven and Hell*. En 1982 la muziko de Vangelis por la filmo *Chariots of Fire* akiris Oskaron.

Kunlaborante kun la reĝisoro *Ridley Scott* li komponis la saman jaron muzikon por la fama scienfika filmo **Blade Runner**. La sukcesan kunlaboradon Vangelis poste ripetis en la jaro 1992, kiam li kreis muzikon por la filmo **1492: Conquest of Paradise**.

Fonto: <https://eo.wikipedia.org/wiki/Vangelis>

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.

Esperanto-Sumoo



Forpasis denaska esperantisto

Nedelin Bojaĝiev naskiĝis en urbo Plovdiv,

1973, en la Esperanto-familio de Eva kaj Nikolao, ambaŭ IRE de ILEI. Li pasigis multe da someroj en IEKursejo Pisanica, kie la gepatroj instruis, partoprenis Esperanto-kurson kaj ricevis sian porkomencantan diplomon de familia koleĝino. Hejme kvarope oni parolis en Esperanto aŭ en franca lingvo.....

Tre malĝoja novaĵo

Nia karega sumooisto A-68. Montarano (s-ro VAJS Ján, Liptovský Mikuláš, Slovakio) mortis.

Jam longe li partoprenis en la sumoo kaj ĉiun fojon li verkis belajn recenzojn.....

Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

UEA



N-ro 1037 (2022-05-22)

Mesaĝo de UEA okaze de la Monda TAGO por Kultura Diverseco por

Dialogo kaj Evoluigo, 21 majo 2022: Lingvoj – portantoj de kulturoj

Kulturo ĉirkaŭvolvas nin kaj estas parto de nia identeco. Ĝi influas kion ni pensas pri ni mem kaj pri aliaj. Kuturo helpas nin kompreni la mondon kaj decidi kiel agi. Verdire, lingvoj kaj kulturoj peras ĉiujn homajn spertojn. Tiel, interkultura dialogo nepre necesas, por konstrui pacon kaj signifoplenan evoluigon. [...]

N-ro 1036 (2022-05-14)

Mesaĝo de UEA okaze de la Internacia TAGO de Familioj, 15 majo 2022: Paco en la homa familio

La TAGO de Familioj konsciigas nin pri familioj kaj iliaj bezonoj Tiu konscio, kaj politikoj por familioj specife, gravas por atingi plurajn celojn de la Tagordo 2030. Familioj estas baza unuo de socio kaj de solidara reto. Inter familioj ni ĉiuj kreskas kaj evoluas, lernas kaj instruas -- kaj ŝanĝas kaj konstruas niajn komunumojn kaj la mondon. [...]

N-ro 1035 (2022-04-27)

Inaŭgura saluto, interlingvistiko, kurso, debato kaj pli: Esperanto en la reta Poliglota Renkontiĝo (28 aprilo - 1 majo)

Esperanto havos spacon en la reta Poliglota Renkontiĝo (Polyglot Gathering Online, PGO), kiun UEA ĉefsponas. PGO okazos de ĉi-ĵaŭde, la 28-a de aprilo (fondotago de UEA), ĝis la 1-a de majo. Pro la ĉefspansoreco individuaj membroj povas [...]

TEJO



(2022-05-22)

Verku por la revuo MONATO kaj ricevu abonon al

la revuo kaj TEJO-membrigon

Por instigi pli da junuloj ekverki en Esperanto, MONATO kunlabore kun TEJO lanĉas novan konkurson. [...]

(2022-05-06)

Ni serĉas faciligantojn por seminarioj okazontaj dum IJK en Nederlando

TEJO serĉas faciligantojn por du seminarioj okazontaj dum IJK en Nederlando. Specife, [...]

(2022-05-05)

Eblas nun voĉdoni por novaj komitatanoj B

En junio 2022 elektiĝos komitatanoj B por dujara mandato. Komitatanoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo en la supera [...]

(2022-05-02)

Kreu Esperanto-muzikalon dum la IJK!

TEJO kaj kvin partneraj organizoj ricevas subvencion por realigi unikan projekton: muzikalo en Esperanto, per Esperanto kaj pri Esperanto. Per la subvencio eblas pagi por vojaĝoj de [...]

(2022-04-29)

Malferma alvoko – TEJO-estranaroj 2022/23

La Elekta Komisiono de TEJO serĉas kandidatojn al la Estraro de TEJO por la mandato 2022-2023. La elektitoj enoficiĝos la 1-an de septembro 2022 kaj finos la mandaton la 31-an de Aŭgusto 2023. La estraro estas la ĉefa plenuma... [...]

Leteroj de niaj legantoj



Saluton estimata,
Sinceran dankon pro la nova 077 numero,
majo 2022 de Turka Stelo. Ĝi ĉiam estas
alloga, interesa kaj nepre leginda. Koran
dankon. Mi sendas al vi mian novan rakonton pri
najbaro. Legu ĝin ĉiuj, kiuj volas amuziĝi.

Kun bondeziroj via

Laimundas Abromas el Litovio



Saluton!
Mi kore dankas vin pro la nova numero de
Turka Stelo.
Mi legas ĉiun numeron kun granda intereso.

Kore

Inger Sjöberg el Swedio



Saluton, kara amiko Vasilij.
Koran dankon pro via divido de la revueto
Turka Stelo k aperigo de mia memoro pri mia
hejmloko!

Fartu bone k sane!

Kore

Gajo el Ĉinio



Estimata , koran dankon pro belega kaj
riĉenhava revuo.

Kiel mi jam promesis, mi sendos al vi E-
tradukon de tre interesa romano

(fragmenton).

Bv donu al mi iom da tempo.

Samideane,

Viktoro Pajuk el Usono



Dankon kara, sed nuntempe mi ne havos
tempon legi vian bultenon - ekzamenoj,
kongresumado, vizito ĉe amikinoj. Ĝi atendos
sian tempon...

Amike

Fejfi ej Slovakio



Dankon estimata!

Ĝis!

Gusho Engjell el Albanio



Tre kara s-ro,

Mi kore dankas vin pro la nova revuo de
turka stelo-077 tio, kio ege volas legi ĝin.

Amike,

d-ro Mukunda Pathik el Nepalo



Kara Amiko,

Dankon pro la bunta rikolto por Majo.

Ĉiam plej interesaj estas la artikoloj pri

estintaj esperantistoj, kies nomoj restis cititaj

pro ilia laboro rilate Esperanton.

Ĉiam ĉarmis min la nomo de Kabe, nekomprenblaĵo

en la esperanta historio. Mi ne povas kompreni lian
decidon, tamen ĉiu havas siajn problemojn, kiujn ne
ĉiam estas de aliaj komprenitaj.

Fine jen miaflanke nova artikolo, historia eĉ ĉifoje.

Dankon kaj gratulojn pro via senhaltita laboro.

Bondezire al vi kaj al la aliaj verkistoj, sen forgesi la

legantojn, kompreneble.

Carmel Mallia el Malto

Malnova fama filmo nun kun esperantaj subtitoloj

Nikos Kazantzakis (1883-1957) estis kreta greka
verkisto, konsiderita la giganto de la moderna greka
literaturo, kaj nomumita por Nobelpremio en Literaturo
naŭfoje.

Inter iliaj romanoj estas "Zorba la greko" (La vivo
kaj tempoj de Aleksis Zorbas 1946), Kristo rekrucumita,
Kapitano Miĥalis , kaj "La Lasta tento de Kristo". Li
ankaŭ verkis teatraĵojn, vojaĝlibrojn, memoraĵojn kaj
filozofiajn eseojn. Li famiĝis mondwide pro la
kinofilmoj "Zorba la greko" (1964) kaj "La lasta tento de
Kristo" (1988).

"Zorba la greko" estas rakonto de juna
grekdevena intelektulo, kiu enriskiĝas eviti sian
librecan vivon kun la helpo de la bruema kaj mistera
grekulo Aleksis Zorba (Anthony Quinn). La rakonto
okazas en Kreto insulo. La romano estis adaptita en
sukcesa kinofilmo en la jaro 1964 fare de greka
reĝisoro Miĥail Kakojanis.

Nia amiko kaj turka esperantisto Pomo Tuffah
tradukis la subtitolojn de tiu malnova filmo kaj
prezentas ĝin al la esperanto mondo en tiu ĉi ligilo:

[https://mega.nz/file/](https://mega.nz/file/BRAgkTaC#VEdbjgLfDQTzK5_U8OnnbJETwyFqds)

BRAgkTaC#VEdbjgLfDQTzK5_U8OnnbJETwyFqds
KO0SfsTslc



SCENEJO KAJ KADRO LOKO KAJ SPACO

La kadro, kiun prezentas al ni la teatra scenejo, tio estas la alta kvadrata areo, kie aperas la aktoroj, kaj la kadro de la kamerao kiu estas la frato de la magia ekrano, la kino, estas foje malsamaj, foje samaj laŭ la efiko, kiun ili kreas.

Ili estas malsamaj: Ĉar kinejo influis la homaron, kiel la Magia Lampo de Aladino ekde la invento de la kinematografio. Ne la giganta feino, sed la senfina nombro da bildoj, kiuj ekaperis el la kameraoj pere de la frotado de multaj reĝisoroj.

Ili estas samaj: Ĉar malgraŭ siaj limigitaj eblecoj kompare kun kino, teatro kreis magion en tiu "malvasta" spaco ekde sia komenco.



Krome, la ludejo en Antikva Grekio estis subĉiela kaj mankis lumo kaj sonteknologio. La prapatro de teatro kaj kino, esras avo preskaŭ 2.500 jaraĝa. Ni povas kalkuli ankaŭ la unuajn ritojn en Egiptio kiel specon de dramo, sed ni ne havas skribitajn ludojn; jes, se ni kalkulas ilin, ĝi devas esti 4.000 jaraĝa avo. Novaj arkeologiaj trovaĵoj povas ŝanĝi tiujn datojn. Sed laŭ nia nuna scio komedioj kaj tragedioj, kiuj estis produktitaj el la manoj de dramistoj, komenciĝas en antikva Grekio. Kiujn ajn informojn ni prenas kiel bazon, kino estas eta infano. Malgraŭ tio, ĝi estis tre aŭdaca, tre aktiva, tre fekunda dum sia preskaŭ 100-jara vivo. Kiom multe prezentis al ni tiu magia ekrano, la blanka kadro, kiu estas la lito de senfinaj bildoj!



Kino ne mortigis la teatron, sed neŭtralis ĝin, malpliigis ĝian influon. Kvankam la salonoj en preskaŭ

ĉiu lando en la tuta mondo estas plenigitaj de la spektantaro, teatro ne plu estas same populara arto kiel kino.

Bone, sed ĉu la teatro ne havas avantaĝojn? Mi pensas, ke la plej granda kaj eble la sola avantaĝo estas, ke ĝi estas viva ludo. Kvankam la kinejo pligrandigas la objektojn kaj aktorojn sur la granda ekrano ĝis la punkto ke ili enpikiĝas en la okulojn de la spektantaro kaj ili povas engluti ilin, ili estas netuŝeblaj. Eĉ se la aktoro sur la teatra scenejo estas malproksime de vi - ni eĉ pensu pri la malantaŭajn seĝojn! - li vikle moviĝas antaŭ ni.

La teatra scenejo estas limigita spaco. Sed talenta grupo de direktoroj kaj aktoroj povas porti nin de tie al senfina spaco. Ne ĉio temas pri teknologio.

Ĉu ĝi povas atingi la kinejon? Ne eblas. La magia ludilo la kamerao kaj ĝia frato, la magia blanka kadro, ili nun havas relative novan membron en la familio: la vidaj efikoj. Tiuj povas preni nin de la profundo de subakvo al la profundoj de la ĉielo kaj eĉ spaco tuje en la sama filmo. Ĉio multe pliboniĝis ekde Georges Méliès, la patro de la kino, kaj mi pensas, ke post tre mallonga tempo malaperos tiu kvadrata percepto nomata "kadro". Virtuala realeco - pli ol tiu en komputiloj kaj sociaj amaskomunikiloj - enmergos nin en la centro de ia ĉiufanka vidaĵo. Ni estos en la interno de iu koncerto, sporta konkurso, fikcio ktp kaj ne restos kiel la ekstera spektanto. Ĉi tiu teknologio jam estas preta. Ni ne estos spektanto de eventoj el la ekstero, sed ni korpe estos en ĝia interno...



Ĉu la morto de teatro avo kaj ĝia nepo la rapida kino estas baldaŭa? La homa formo ne mortas, se ĝi ne mortas sur la tero aŭ transformiĝas kun la hodiaŭa emocia kaj mensa strukturo. Metaverso, Elon Musk, Ray Kurzweil, Michio Kaku estas nomoj, kiuj flugas en mia menso... Ekzemple, ĉu ni estos homoj, kiuj >>>30





1. MI NOMIĜAS NIGRO

Post foresto de dek du jarojn mi eniris Istanbulon kiel dorm-iranto. "La tero alvokis lin," oni diras por homo kiuj estas mortonta, kaj en mia kazo, estis la morto, kiu alvokis min reen al la urbo kie mi naskiĝis kaj kreskis. Kiam mi unue revenis, mi pensis, ke estis nur morto; poste, mi ankaŭ estis renkontanta amon. Amo tamen estis malproksima kaj forgesita afero, kiel miaj memoroj de vivado en la urbo. Estis en Istanbulo, dek du jaroj antaŭe, ke mi enamiĝis senhelpe al la filino de mia onklino.

Kvar jarojn poste mi forlasis Istanbulon, dum vojaĝante tra la senfinaj stepoj, neĝkovritaj montoj kaj melankoliaj urboj de Persujo, portante leterojn kaj kolektante impostojn, mi konfesis al mi mem, ke mi malrapide estis forgesanta la vizaĝon de mia infanaĝa amo, kiun mi postlasis. Kun kreskanta paniko, mi provis senespere memori ŝin, nur por rimarki, ke malgraŭ amo, vizaĝo longe nevidita finfine fadas. Dum la ses jaroj, kiujn mi pasigis en la oriento, vojaĝante aŭ laborante kiel sekretario en la servo de paŝaoj, mi sciis, ke la vizaĝo mi imagis ne plu estis tiu de mia amatino. Poste, en la oka jaro, mi forgesis tion, kion mi erare ekrememoris el la sesa jaro, kaj denove bildigis tute alian vizaĝon. Tiel, en la dek-dua jaro, kiam mi revenis al mia urbo en la aĝo de tridek ses, mi estis dolore konscianta, ke la vizaĝo de mia amatino jam delonge eskapis el mia menso.

Multaj el miaj najbaroj, amikoj kaj parencoj jam mortis dum mia dekdujara ekzilo. Mi vizitis la tombejon, kiu superrigardas la Oran Kornon ¹ kaj preĝis por mia patrino kaj por la onkloj, kiuj jam forpasis dum mia

foresto. Laodoro de la kota grundo miksiĝis kun miaj memoroj. Iu rompita argilano kruĉo apud la tombo de mia patrino. Por iu ajn kialo, rigardante la rompitaĵojn, mi ekploris. Ĉu mi ploris pro la mortinto aŭ ĉar, strange, mi estis ankoraŭ nur ĉe la komenco de mia vivo post ĉiuj de tiuj jaroj? Aŭ ĉu ĉar mi alvenis al la fino de mia vivo-vojaĝo? Malforta neĝo estis falanta. Sorĉita per la flokoj blolitaj tien kaj reen, mi iĝis perdita en la malcertecoj de mia vivo, ke mi ne rimarkis nigran hundon rigardante al mi el malluma angulo de la tombejo.

Miaj larmoj kvietiĝis. Mi viŝis mian nazon. Mi vidis la nigran hundon svingi sian voston amikeme, kaj tiel mi forlasis la tombejon. Iom poste, mi ekloĝis en nia najbarejo, luante unu el la domoj, kie parenco de mia patra flanko iam loĝis. Ŝajnas, ke mi rememorigis al la gastejstrino sian filon, kiu estis mortigita de la Safavidaj ² soldatoj ĉe la fronto kaj tiel ŝi konsentis purigi la domon kaj kuiri por mi.

Mi ekiris sur longaj kaj kontentigaj piediroj tra la stratoj, kvazaŭ mi ekloĝis ne en Istanbulo, sed provizore en unu el la arabaj urboj ĉe la alia flanko de la mondo. La stratoj fariĝis pli mallarĝaj, aŭ tiel ili ŝajnis al mi. En certaj partoj, sur vojoj kiuj premiĝis inter domoj klinaĝantaj unu sur la alian, mi devis froti kontraŭ muroj kaj pordoj por eviti esti trafita de la ŝarĝitaj ĉevaloj. Ĉu nun estas pli da riĉaj homoj, aŭ tiel ŝajnis al mi? Mi vidis okulfrapan kaleŝon, kiun oni ne trovas en Arabio aŭ Persujo; ĝi estis kiel fortikaĵo tiritita de fieraj ĉevaloj. Proksime de Ĉemberlitaŝ ³ ene de la malbonodoro, kiu venis el la kokino-merkato mi vidis kelkajn avidajn kaŭrantajn almozulojn alportantajn ĉifonojn. Kaj unu el ili estis blinda kaj ridetanta al la falanta neĝo.

Se mi estus dirita ke en la pasinteco Istanbulo estis pli malgranda, pli malriĉa sed pli feliĉa urbo mi eble ne kredus je tio, sed tio estis, kion mia koro diris al mi. Kvankam la domo de mia amatino estis en ĝia ĉiama loko inter tiliarboj kaj kaŝtanoj, aliuloj nun loĝis en ĝi, fakto, kiun mi lernis demandante ĉe ĝia pordo. Mi malkovris, ke la patrino de mia amatino, mia patrino onklino, jam mortis, kaj ke ŝia edzo, mia Eniŝteo ⁴ kun lia filino moviĝis for. Mi lernis el tiuj ĉe la pordo, kiuj senkonscie kaj senkompate detruis miajn sonĝojn, ke miaj parencoj travivis kelkajn misfortunojn. Mi ne priskribos ĉion ĉi al vi nun, sed permesu al mi diri, ke kvankam mi rememoris varmajn, verdajn kaj sunplenajn somerajn tagojn, la glacieroj pendantaj el tiu tiliarbo en ĉi tiu malnova ĝardeno, kaj ĝia mizera, neĝkovrita kaj neglektita aspekto elvokas en la koro



nenion krom morto.

Mi jam sciis pri kelkaj detaloj de tio, kio okazis al miaj parencoj per leterokiu sendis mia Eniŝteo al mi, dum mi estis en Tebrizo. En tiu letero, li estis invitanta min al Istanbulo, klarigante, ke li estis preparanta sekretan libron por nia sultano, kaj ke li petis mian helpon. Li aŭdis, ke dum la periodo mi estis en Tebrizo, mi pretigis librojn por osmanaj paŝaoj, provincaj regantoj kaj Istanbulanoj. Kion mi faris tiam estis preni la monon antaŭdonitan de miaj klientoj, kiuj ordonis la manuskriptojn, kaj provis trovi miniaturistojn kaj kalligrafiistojn, kiuj estis senkontentaj de la militoj kaj la ĉeesto de osmanaj soldatoj kaj ankoraŭ ne foriris al Kazvinon aŭ al iu alian Persan urbon, kaj komisii al tiuj majstroj, kiuj ankaŭ plendis pro malriĉeco kaj neglekto, pretigi la paĝojn, ornami ilin kaj bindi ilin kiel libroj kaj poste sendi la librojn al Istanbulo. Se ne estus la amo pri ilustrado kaj pri belaj libroj, kiujn donis al mi mia Eniŝteo en mia juneco, mi neniam enmiksiĝus en tiaj okupoj.

Ĉe la merkato fine de la strato, kie iam mia Eniŝteo vivis, mi trovis la barbiston, majstro de sia metio, en lia butikoj inter la samaj speguloj, raziloj, kruĉoj de akvo kaj sapo-penikoj. Min kaptis lia okulo, sed mi ne certas ĉu li rekonis min aŭ ne. Ĝi plaĉis al mi vidi, ke la kapo-lavujo, estis ankoraŭ pendanta per ĉeno el la plafono kaj ankoraŭ spuris la saman malnovan arkon svingante tien kaj reen dum li plenigis ĝin per varma akvo.

Kelkaj el la kvartaloj kaj stratoj, kiujn mi vizitadis en mia juneco, dum tiuj dek-du jaroj, jam malaperis en cindroj kaj fumo kaj estis anstataŭigitaj per brulruinoj, pleniĝis je strathundoj, kiuj blokis la vojon de homoj, kaj stranguloj, kiuj timigis la najbarajn infanojn. Dum mia foresto en aliaj areoj detruitaj per fajro grandaj riĉaj domoj estis konstruitaj, kaj min mirigis la malŝparemo, la fenestroj el la plej multekostaj veneciaj fumigitaj vitroj, kaj la pompaj duetaĝaj loĝejoj kun korbelfenestroj.

Ĝuste tiel, kiel en multaj aliaj urboj, mono ne plu havis valoron en Istanbulo. En la tempo kiam mi foriris al la oriento, la bakejoj, kiuj kutimis vendi grandajn cent drakmajn⁵ panojn por unu arĝenta monero, nun por la sama prezo vendis duonon de tiuj panoj, kiuj ne plu gustumis same kiel, tiuj en mia juneco. Se mia forpasinta patrino vidus, ke nun ŝi devus pagi tri arĝentajn monerojn por dekduo da ovoj, ŝi dirus, "Ni devas tuj forlasi ĉi tiun urbon antaŭ ol la kokinoj kreskas tiom senindulgaj, ke ili fekos sur nian kapon anstataŭ sur la grundon." Tamen mi sciis la problemon de tiu devalutita mono, kiu estis ĉie. Onidiro estis, ke la venecaj kaj flandraj komercaĵo-ŝipoj estis plenaj je kestoj de falsaj moneroj. Antaŭe en la reĝa monforĝejo

kvincent moneroj estis faritaj el cent drakmoj de arĝento, sed nun pro la senfinaj militoj kun la Safavidoj oni faris okcent monerojn el la sama kvanto de arĝento. Kiam la janiĉaroj⁶ malkovris, ke la moneroj per kiuj ili estis pagitaj fakte floris en la Ora Korno, kiel sekigitaj faboj, kiuj falis el la digo de la vegetarvendistoj, ili tumultis kaj sieĝis la palacon de nia Sultano, kvazaŭ ĝi estus fortikaĵo de malamiko.

Predikisto en Bayazid moskejo nomita Nusret, kaj pri kiu oni asertis, ke li estis posteuloj de nia glora profeto Mahometo, fariĝis fama dum ĉi tiu periodo de malmoraleco, inflacio, krimo kaj ŝtelado. Tiu imamo, kiu estis el Erzurum urbo, atribuis la katastrofojn en Istanbulo en la lastaj dek jaroj – inkluzive la fajrojn en Bahĉekapi kaj Kazancilar distriktoj, la plagojn, kiuj mortigis dekmilojn da homoj, kaj la senfinajn militojn kun la persoj, kiuj kostis sennombrajn vivojn, kaj ankaŭ la perdiĝo de malgrandaj otomanaj fortikaĵoj en la okcidento pro la ribeloj de Kristanoj – en la devojiĝo de la vojo de nia Profeto, ignorante la leĝojn de la Glora Korano al toleremo por Kristanoj, kiuj libere vendis kaj trinkis vinon, kaj al la muziko ludanta en la derviŝejoj.⁷

La peklaĵ-vendisto, kiu pasie informis min pri la imamo el Erzurum, rakontis al mi, ke la falsitaj moneroj – la novaj dukatoj, la falsaj guldenoj stampitaj kun leonoj kaj la osmanaj moneroj kun la ĉiam malkreskanta arĝenta enhavo - kiuj inundis la merkatojn kaj bazarojn, kiel la ĉerkesoj, abazianoj, bosnianoj, kartvelanoj kaj armenoj, kiuj plenigis la stratojn, trenadis nin al absolutan degeneradon de kiu estus malfacile eskapi. Li aldonis, ke la friponoj kaj ribeluloj grupiĝas en kafejoj kaj klaĉas ĝis tagiĝo; nekonataj homoj kun dubinda karaktero, opio-maniuloj, stranguloj kaj partianoj de la senpaca Kalenteri derviŝo sekto, kiu pasas la noktojn en derviŝejoj, kie dancadas kun muziko ĝis mateniĝo, kaj penetras siajn korpojn per pikiloj, ili faras ĉiujn malĉastaĵojn, kaj poste fikas unu la alian kaj la junajn knabojn, kiujn ili trovas.

Mi ne scias, ĉu ĝi estis la melodio sono de liuto, kiu devigis min sekvi ĝin, aŭ ĉu la konfuzo de miaj memoroj kaj deziroj simple mi ne plu povis elteni la virulentan peklaĵ-vendiston, kaj tiel mi kaptiĝis al la muziko kiel eskapvojo el tiu konversacio. Mi tamen scias tion: Kiam vi amas urbon kaj esploras ĝin ofte perpiede, post multaj jaroj ne nur via korpo sed ankaŭ via animo konas ĝiajn stratojn tiel bone, ke dum momento de melankolio en kiu ankaŭ la malpeza neĝo falas malgaje, vi malkovras, ke viaj kruroj portas vin propravole al unu el viaj preferataj montetoj.

Tio estis, kiel mi forlasis la merkaton de huffaristoj kaj mi rigardadis la neĝon falantan sur la Oran Kornon el punkto apud la moskejo de Sulejmanije⁸: Neĝo jam komencis amasigi sur la tegmentoj, kiuj alfrontas la

nordon kaj sur la partoj de kupoloj, kiuj estas malŝirmitaj al la nordorientaj frostaj ventoj. Salutis min, la malleviĝataj veloj de alproksimiĝanta ŝipo, kiuj havis la saman plumbo-grizan koloron de la surfaco de la Ora Korno. La cipresoj, kaj platanarboj, la tegmentoj, la malĝojo de la krepusko, la internaj sonoj venantaj el la kvartalo malsupren, la krioj de la vendistoj, kaj la voĉoj de la infanoj ludantaj en la korto de la moskejo miksiĝis en mia kapo kaj anoncis senmirige, ke ekde nun mi ne plu povus vivi ie ajn sed nur en mian urbo. Mi ekhavis la senton, ke la vizaĝo de mia amatino, kiu fadis jam jarojn antaŭe, subite ekaperos antaŭ miaj okuloj.

Mi komencis marŝi malsupren de la monteto kaj kunfandiĝis en la homamason. Post la vespera preĝo, mi plenigis mian stomakon ĉe hepato-manĝejo. En la malplena manĝejo mi aŭskultis atente la posedanton, kiu kompate rigardis min manĝi unu mordaĵon post la alia, kvazaŭ li estis manĝiganta katon. Pere de la inspiro kaj strat-direktoj mi prenis de li, post kiam mallumo kovris la urbon mi trovis min turnantan malsupren unu el la mallarĝaj stratetoj malantaŭ la sklav-merkato kaj trovis la kafejon.

Interne, estis homplena kaj varma. La rakontisto, homo tiel, kiel mi vidis multe en Tabrizo kaj en aliaj persaj urboj, kiun oni tie konas per la nomo "kurten-rakontisto" sed ĉi tie "komediisto", estis sur podio apud la fajrujo. Li jam havis malfalditan paperon, kiun pendis antaŭ la amaso. Sur ĝi estis desegnaĵo de hundo, farita

haste sed elegante. Li de tempo al tempo estis montranta la hundon kaj li parolis el la buŝo de la hundo.

¹ "Ora Korno" nomo de la mara eniraĵo en la formo de mallarĝa sed longa golfo en Istanbul.

² "Safavido" ano de persa lando kies ĉefurbo estis en la nuna azerbajĝano.

³ "Ĉemberlitaŝ" (originale: Çemberlitaş) bizanca monumenta kolono en Istanbul kiu detruigis pro fajro kaj en la osmana periodo ĝi estis kovrita per metalaj paneloj kontraŭ falo de marmoroj.

⁴ "Eniŝteo" (originale: Enište) la edzo de la onklino, tiu estas turka parenc-nomo.

⁵ "drakmo" Helena unuo de pezo (3,24 g) kaj arĝenta monero.

⁶ "janiĉaro" Membro de la persona gvardio de turkaj sultanoj.

⁷ "derviŝo" Vaganta islama monaĥo: "turniĝanta derviŝoj" derviŝoj kiuj serĉis ekstazon per ilia danco.

⁸ "Sulejmaniye" (originale: Süleymaniye) unu el la plej grandaj kaj gravaj moskejoj en Istanbul konstruita de arkitekto Sinan.

(daŭrigota)

tradukis Vasil Kadifeli el Turkio

La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj -- de Vytautas Petkevičius

tradukis kaj sendis
Antanas Vaitkevičius el Litovio

14. La moderema Terpomo

A kompanataj de Ajlo kaj Cepo, la amikoj malsupreniris laŭ ŝtona spirala ŝtuparo en ian neventolatan subterejon kaj nedecideme haltis antaŭ peza pordo, pli similanta al granda pordego.

La surskribo anoncis: La historia Muzeo de GAJA KORTO.

La prizorgantoj frapis al la pordego, atendis ĝis ĝia malfermo, poste puŝis la amikojn internen kaj tuj refermis ĝin per rigliloj.

En la granda kelo treme brilis nur kelkaj sebaĵ lumigiloj. Sur la muroj estis pendigitaj malfacile videblaj bildoj, fotoj kaj desegnaĵoj. Ĉe eta tableto sidis ia estaĵo kaj per lupeo inspektis la enirintojn.

- En ĉi kelo nin ne helpas eĉ niaj pafiloj, - rondrigardinte decidis Glano. - Kial vi elpufigis la okulojn? Ĉu vi neniam vidis soldatojn?

Ilin aliris maljuna sulkiĝinta Terpomo. Lia konstanta sidado en duonlumo kaŭzis elkreskon de maldensa blanka liphararo, liaj vangoj estis kaviĝintaj,

la okuloj malpufiĝintaj, lia vizaĝo estis plena da sulkoj, tamen li kondukis tre digne, konstante ŝanceligis la kapon kaj murmuris ion subnaze.

- Por kio vi estas enŝovita ĉi tien? - demandis Pizeto kompate.

- Vi estas needukita mallertulo. Mi estas libera civitano kaj loĝas ĉi tie memvole.

- Estas agrable aŭdi tion, - ridis Glano. - Kaj ni estas pelitaj perforte ĉi tien.

- Nun estu konciza. Eldiru tiun plej ĉagrenan rakonton pri via urbo kaj mi vin plu ne klopodos.

- Pardonu min, sed per kiu piedo vi hodiaŭ ellitiĝis?

- Ĉu tio gravas por vi?

- Por scienco ĉio gravas! De ĉi fakto dependos via humoro dum la tuta tago.

- Ĉi nokte ni tute ne elseliĝis.

- Bedaŭrinda afero, - muĝetis Terpomo. - Kaj kiam vi rajdis en la urbon, ĉu neniu transkuris vian vojon?



- Ni ne estas superstiĉemaj.
- Tio ne gravas, - refutis Terpomo. – Tiuj komplikaj signoj sendatas al ĉiu viva estaĵo, por ke li evitu malfeliĉojn.

Pizo tuŝis sian frunton per fingro kaj turnetis ĝin.

- Ĉu hodiaŭ ne estas lundo, ĉu ne dektria tago de monato? – daŭre demandadis Terpomo.

- Ne, hodiaŭ estas vendredo kaj dudek sesa, - respondis Rapiduleto.

- Bonege. Nun bonvolu kraĉi tri fojojn trans via maldekstra ŝultro. Kaj sep fojojn trans la dekstra. Tio estas ĉio. Interalie, mi preskaŭ forgesis: nun desegnu po rondon ĉirkaŭ si.

Tirante ŝultrojn, la amikoj plenumis ĉion ordigitan.

- Nun reversu siajn poŝojn kaj diru: honorigita estu Koko.

- Kial ne Kokino?

- Vi ĉion difektigis. Vi devos ĉion refari. Koko estas la plej granda malamiko de ĉiuj monstroj.

La amikoj ne plu eltenis:

- Aŭskultu, Terpomo, ĉesu la rikanadon. Ĉu vi konas per kio ĉi ileto kraĉas? – Glano subnazigis al li la tubon de la pafilo.

- Pasintmonate mi sonĝis ratojn. Tio signifas malfeliĉon.

- Nun mi komprenas, kial ĉiu eksterlandano estas perforte altrenita ĉi tien kaj ŝlosita per naŭ seruroj, - diris Glano kaj pafegis per sia armilo en la plafonon.

Terpomo kaŭriĝis, ŝtopis la orelojn, kaj poste malkuraĝe diris:

- Per kiu fingro vi premis?

- Per montra fingro. Ĉu tio havas ian sekretan sencon?

- Kompreneble. Se vi estus preminta per la longa, tio signifus ĝojon, kaj se per ringa fingro – malfeliĉon.

- Pizo, premetu laŭ lia volo per la longa fingro, kaj ni ekvidos ĉu post tio li longe ĝojos.

- Malfeliĉulo, mia pacienco estas en viaj manoj, do ne estu sinmortiganto, - ne eltenis ankaŭ Pizo. – Diru, kion vi faras ĉi tie kaj kion vi bezonas de ni.

- Mi bezonas nenion. Mi ekloĝis en ĉi kavo por eviti malfeliĉojn, atendantajn min. Kaj nun estas jam dudek jaroj, dum kiuj neniun transiras mian vojon, mi renkontas neniun kun malplenaj siteloj, la plenluno neniam rigardas al mi... Estas jam dudek jaroj, dum kiuj mi ne konjektas, kiam estas lundo kaj kiam estas la dektria tago de monato. Kaj jam estas du semajnoj, kiam mi, batalante kontraŭ malbonaj sonĝoj, ĉesis dormi. Tio estas la lasta frapo al diversaj malfeliĉoj!

- Kaj ĉu feliĉo iam vizitadas vin?

- Kial mi ĝin bezonu? Feliĉo kaj malfeliĉo ĉiam vagas tra la mondo kune: se vi enlasos unun, la alia eniros nepermesata.

- Vi estas nevenkebla en diskuto. Eldiru vian rakonton, kaj ni forvojaĝos.

- Tuj. Ĉu vi ne havis okulspasmojn? Ĉu via nazo ne jukis? Ĉu ne? Ĉu vi ne singultis? Ĉu vi ne vundis piedojn transpaŝante la sojlon? Ĉu vi ne aŭdis la grakadon de Korako?..

- Pizo, pafu! – perdinte paciencon, ekkriis Glano.

- Nu, bone, bone. Mi komencas rakonti. Jen sur la muro vi vidas ridantan Akvomelonon. Antaŭ multaj jaroj tiu bonkora civitano estis nia estro. Li tre ŝatis ridi. Vi montras al li fingron, kaj li ekridas sen ia plua kaŭzo. Kaj mi ĵuras per Kreno, se iu tuŝis lian osteton de rido, li eĉ tri tagojn ploris per ridaj larmoj.

Sekvante sian estron, ĉiuj tomatoj kaj kukumoj infektiĝis per tiaj malsanaj ridoj. Nur ni, terpomoj, estis solaj, kiuj modere ridetis inter la stultaj ridegantoj. Pro la moderemo la urbanoj elektis min vicestro.

Dum unu gaja tago super la urbo flugis Korako kaj ne grakis eĉ unu fojon. Ekvidinte ĉi teruran signon de malfeliĉo, mi senprokraste admonis Akvomelonon, tamen li malatentis min kaj ekrikanis pri miaj vortoj. Rikanante, li tiom ridegis kaj daŭrigis tion ĝis lia ventro splitiĝis.

Ekvidinte tion, ekridegis ankaŭ ĉiuj homoj de la ĉirkaŭaĵo. Ilia ridego kaŭzis la morton de nia bonega estro. Ridskuante ili akompanis lin al la tombejo, enterigis kaj, sufokiĝante pro rido, starigis la monumenton. Sed la monumento realiĝis kripla kaj amuza. Alivorte, disde tiu tago neniun plu laboris, ne pagis impostojn, nur ridis ĉirkaŭbrakinte la ventrojn. La urbon ekminacis la monstro de malsato kaj ĥaoso.

Longe turnis kapojn doktoroj, kiel ĉi malsano estu kuracebla, tamen nenion taŭgan kapablis pripensi. Komence ili surkovris la monumenton de Akvomelono per ŝtofo. Poste ĉe ĉiu stratangulo estis starigitaj kanonoj por timigi homojn, la homoj estis ordonigitaj fermi la buŝojn kaj la buŝoj de malobeintoj estis kudrigitaj. Sed eĉ tio ne efikis: en siaj pensoj la loĝantoj daŭre ridegis kaj plu malsanis je ĉi ridomorbo.

Tiam nian distrikton vizitadis la reĝino de la Lando de Malvirtoj, la Granda Ni. Atinginte nian urbon – jen vi vidas en la bildo ŝian kaleŝon – ŝi haltis ĉe la pordego, atendante por iu renkonti ŝin. Tamen neniun aperis. Ĉirkaŭe regis morta silento. Ĉiuj estis bandaĝitaj kaj kudrigitaj kaj kuracis sin de ridoj.

- Pro kio ĉi funebro? Prenu la ŝtofaĉon for de la monumento! – ekkoleris la reĝino.

La ŝtofo estis forprenita. Sur la kurba fundamento Akvomelono kaŭriĝinte ridegas. Aspektis li kvazaŭ viva: la okuloj duonfermitaj, plenaj da larmoj, surnaze du verukoj ĉirkaŭbrakis, kaj li mem, ĉirkaŭbrakinte la ventron ne kontrolas sin – pro bongusta rido li tuta skuadas kaj saltadas. Sube ĉe la piedoj estas skribita:

Ridu ĉiuj, kiuj povas,

Rid' malsanojn tuj forblovas.

La reĝino ne eltenis: rideto aperis de orelo ĝis orelo kaj aŭdiĝis ŝia snufeto. Aŭdinte tion, ĉiuj ekridegis, ekridskuis. La Granda Ni pensis, ke la regatoj ridas pri ŝi, do ŝi rigoriĝis terure kaj minacis al ili:

- Nu, atendu, mi ridigos vin eĉ pli multe.

Post kelkaj tagoj ŝi enoficiĝis Krenon la urbestro. Tiu sur ĉiu angulo pendigis la portretojn de si mem, sia edzino Sinapo kaj siaj vicestroj Cepo kaj Ajlo. Li ĉion per sia aromo absorbigis. Kaj nun, miaj karaj, provu ne ploreĝi! La okuloj mem ploras. Kaj se aperas kuraĝulo aŭdacanta ekrideti, Ajlo kaj Cepo al li tiel ŝmiras la okulojn, ke li ploreĝas kvazaŭ abunde pagita.

Post la reformado ĉiuj loĝantoj tuj ĉesis ridi. Tamen al Kreno tio ne sufiĉis. Li kunpelis ĉiujn loĝantojn de la distrikto kaj ordonis, ke ili ĉevoje plantu reĝajn vegetaĵojn – drozerojn (La tradukinto ripetas la klarigon, prezentitan en ĉapitro 13: La vorto "drozero" en la litova lingvo signifas "saulaŝarė", laŭvorte – Larmo de Suno. Tial la aŭtoro "plorigis" ilin.) Ili estis plantitaj. Apenaŭ ili alkreskis, ili eknazmukis, komencis larmojn gutfluigi. Pro ilia plorado ĉiuj ĉevojejoj malsekiĝis, saliĝis. Sekiĝis arboj, bruniĝis herboj kaj kun la fluo de tempo ĉio blankiĝis, kovriĝis per salo. Tomatoj kaj kukumoj pro siaj larmoj fermente acidiĝis. Jen kion kaŭzis la apero de Korako!

- Vi parolaĉas sensencaĵojn. Tia malsano estas facile kuracebla, - mansvingis Glano. – Forpelu Krenon kun lia tuta akompanantaro, elradikigu drozerojn, kaj ĉio estos finita!

- Kion vi diras? Tio estas neniam farenda. Post tio ĉiuj reridegos.

- Do ridegu ili kaj estu sanaj.

- Kaj kiu laboros, kiu pagos impostojn?

- Ĉu multe da laboro ili efektivas ploreĝante! – ne cedis Pizeto.

- Plorante ili iomete timas Krenon, sed kiam ili ridas, vi povas per kanonoj pafi, ili nenion atentis.

Krome, estas pli facile mortpremi fermentiton, ol sanulon.

- Mi nenion komprenas, - eĉ skuis sin Pizo. – Ridi estas malbona, plori estas ankaŭ malbona, do kio estas farenda, se mi ridemas, aŭ al mi io ajn doloras?

- Unue vi devas rondrigardi kaj klarigi sin, ĉu vian ploradon aŭ ridadon ŝatas la estro, kaj nur tiam vi povas ridi aŭ plori. Mia celo estas moderemo. Jam dudek jarojn mi nek ploras, nek ridas kaj jam estas du semajnoj, kiam mi ne havas malbonajn sonĝojn.

- Vi ne dormos unu semajnon plu kaj vi mortrektigos siajn gambojn: tiam vi vere nenion plu bezonos kaj neniu transkuros vian vojon, - Glano konsolis modereman Terpomon. Kaj ni ambaŭ ripozos, kvankam ni sonĝu pri du tiaj sulkiĝintoj, kiel Terpomo, - diris li al Pizo. – Ĉi tie, fraĉjo, estas malvarmete kaj kuloj ne atakas.

La amikoj bariĝis de tiu sulkiĝinta Terpomo per pajlero kaj pretiĝis ekdormi, sed la kontraŭparolulo vekis ilin:

- Kial vi ekkuŝis direktinte siajn kapojn al la pordo? Tio estas tre malbona signo. Ĉu vi pensis, kion pri tio opinios Kreno?

- Atentu, Terpometo. Ĉi pafilo estas ŝarĝita per la dento de nigra Katino, kiun alportis al mi nigra Korako dum malluma nokto. Atentu, ĉar ĉi foje mi premos la ellasilon per la ringa fingro.

Terpomo silentiĝis. Li profundiĝis en la libron, dezirante klarigi sin pri la signifo de ĉi signoj. Kaj la amikoj tiel dolĉe ekdormis, ke eĉ dum iliaj sonĝoj ili ridetis unu al la alia.

(daŭrigota)



"La aventuroj de Glano en la Lando de Malvirtoj" estas libro de litova verkisto Vytautas Petkevičius (1930 – 2008). Li estas sufiĉe konata kaj precipe fama pro siaj porinfanaj kreaĵoj.

17>>

La situacio baldaŭ pliboniĝis kiam la du najbarinoj interparolis pri la sinteno de la hejmbestoj. La florpotoj estis forigitaj, sekve la hundo kaj la kato denove feliĉiĝis.

La lasta parto de la prelego de Jens temis pri hundo, kiu ĉiutage venis en preĝejon en Italio. En la pasinteco tiu hundo spertis malĝojigan vivon. Sola, kaj forlasita sur vasta kampo, tiel maljunulino trovis ĝin. Kompate ŝi kunprenis la hundidon kaj bone prizorgis ĝin. Kiam la maljunulino mortis, la hundo denove estis sola. Dum la funebra servo kaj la enterigo la hundo ĉeestis. Ekde tiu tago ĝi ĉiutage revenis al la preĝejo,

sidiĝis antaŭ la benkoj atendante la fino de la diservo. La fidela besto ja ne povis kompreni, ke la maljuna posedantino por ĉiam forlasis ĝin. Ĉiuj vizitantoj de la preĝejo alktumiĝis al la fidela hundo kaj adoptis ĝin kiel hundon de la komunumo.

(daŭrigota)

verkis **Klaus Friese** el Germanio
(plumnomo Erik Tantal)

Fonto: <http://esperanto-klaus.de/>



Esperantisto Simeono havas malbonan karakteron. Li mem tiel ne pensas, sed najbaro lia pri tio certas. Pli frue aŭ malpli frue tiu interparolo devis okazi. Kaj ĝi okazis. Estis serena printempa tago. Surkorte renkontiĝis Simeono kaj lia najbaro.

– Simeono, vi havas malbonan karakteron; kun vi oni ne povas interparoli, pri nenio interkonsenti, ĉiam vi ien perdiĝas kun viaj esperantistoj, ne respondas vi al telefonalkvokoj, ĉiam vi iun kulpigas, ke oni vin trompas, vi kontrolas nek situacion, nek vin mem; – atakis la najbaro Simeonon.

– Sed pro kio vi konstante petas min, ke mi helpu vin kaj poste primokas min kaj Esperanton? – ne cedis Simeono. – Ĉu vi havas neniun, kiu helpu vin?

– Pro la okazintaj historiaj cirkonstancoj – mi estas via najbaro.

– Kia mi estas – tia mi mortos. Aŭ vi akceptu min tian, kia mi estas kaj ĉesu riproĉi, aŭ transloĝiĝu al alia loko, – respondis Simeono.

– Mi ne diras „estu vi alia“, mi ne kontraŭas vian Esperanton, sed eble vi povas por nia amikeco iomete ŝanĝi vian karakteron? – ne ĉesis ataki najbaro.

– Kion vi volas?! Tiel paroli povas nur ne edukita homo, – serioze ekkoleris Simeono.

– Malmulton... Estu vi pli facile divenebla... Interparolu kun mi, reagu al miaj telefonalkvokoj, sciigoj, leteroj. Se vi ne povas paroli – donu sciigon, skribu: „okupiĝinta“, „morgaŭ“, „sekvontsemajne“, sed neniam silentu, diablo vin pren... , – edukis Simeonon la koleriĝinta najbaro. Li gestadis permane kaj ruĝiĝis ne komprenante, kiel klarigi al tiu malsaĝulo.

– Pro kio vi tiom bruas? Se mi reagu al ĉiu telefonalkvoko, sciigo aŭ letero, mi farus nenion pli – nur priparolus fremdajn aferojn... Se mi ion laboras, pensas, legas, mi tiam forligiĝas de ĉio. Min senatentigas ĉiuj, tiuj interesantoj. Mi ne estas iu respondeculo, direktoro – do vi komprenu, – ne cedis Simeono.

Najbaro mallevis la kapon kaj ekpensis; kiuj vortoj tratabu la obstinecon de Simeono, por ke li ne estu tia sensocia cinika azeno.

– Aŭskultu, Simeono..., – ankoraŭ observante la korton komencis najbaro. – Unu saĝa homo, – (kompreneble, la najbaro enkaŭ pensis pri si mem), – eldiris: „Konscie uzataj sciigoj donas prudenton, celkonforme uzata prudento verkas karakteron, respondece uzata karaktero verkas liberon“. – parolis la najbaro:

– Aŭskultu vi atente, la homa karaktero estas pordego al libero. Tamen libero ne eblas

senrespondeca. Via karaktero devas esti respondeca. Aliokaze estos malordo, senkontentiĝo, riproĉoj, kulpigoj kaj fine seniluziigo kaj problemoj. Kiom bona vi estus, tamen vivas vi inter homoj kaj kun la homoj. Ne ignoru ilin, vi ne fermu vin inter viaj esperantistoj, serĉu la kontaktojn kun aliaj homoj, etendu la manon kaj finfine estimu ilin.

Post tiom longa najbara edukado ili ambaŭ eksilentis. Se vi estus vidintaj, kiel Simeono konfuziĝis, kiel malgrandiĝis, kiel liaj okuloj ruĝiĝis.

– „Kio verdire estas tiu karaktero? – ekpensis Simeono. – Kaj por kio ĉi tie estas ligita tiu volo? La najbaro ŝajne volas min reeduki“.

– La libero estas libero kaj vi ne ŝovu ĉi tien viajn kondiĉojn. Mi vivas ne por aliaj, ne por ke plaĉu mi al aliaj..., mi vivas por ne kaŭzu mi al aliaj la problemojn. Mi vivas en mia mondo, en Esperantujo, kiun vi nomas la ĥaoso, kaj mi ne bezonas la kunagantojn, por ke al tiuj la ĥaoso iĝu pli orda. Al mi plaĉas la ordo en nia Esperantujo, al mi plaĉas tiu „malordo“, kaj ĝis mi estos viva, mi al neniu permesos ĝin tuŝi! – ne subiĝis Simeono.

– Mi ne atencas vian sendependecon. Mi petas nur normalan kontakton kun vi, – po iomete jam cedis najbaro. – Eble mi volas iĝi via adepto.

Porlonge enpensiĝis Simeono, por decidi ion.

– „Prudento, volo, karaktero..., nu jes, mi iam montras mian karakteron; mi kontraŭas kaj pruvigas al miaj kunlaborantoj kaj geamikoj, malsamopinias mi al kluba prezidanto kaj samideanoj, kaj al multaj homoj tio ne plaĉas. Karaktero, al mi ŝajnas, estas por defendi sian propran opinion, liberon... Jes, havi karakteron – estas granda lukso. La karaktero estas diamanto – bela, sed terure dura kaj freneze multekosta... Ĉu nur pro mia karaktero forlasas min gesamideanoj? Alidire, kulpas la naciaj trajtoj... Ĉu mi kulpas? Tio estas la malbenita litova karaktero kontraŭi. Kiel tio malnoblas! Necesas ion fari.“

Post longa paŭzo Simeono manpremis al najbaro kaj diris:

– Bone, mi penos pli perfektigi mian karakteron. – Pardonu min. Vi malfermis al mi miajn okulojn kaj vidigis al mi miajn malbonajn ecojn. Ekde hodiaŭ mi ŝanĝos mian karakteron.

verkis kaj sendis **Laimundas Abromas** el Litovio

Poul Thorsen



La Dano Poul Thorsen (1915-2006) estis unu el la plej konataj verkistoj kaj aktivuloj en Esperantujo dum la dua parto de la lasta jarcento. Li estis profesie instruisto de la dana lingvo, sed aktivis kiel esperantisto ekde sia junaĝo. Lia esperantisma aktivado estis plej diversa. Li estis kunfondinto de Dana Laborista Esperanto-Asocio kaj la Komuna Konversacia Klubo en Kopenhago. Li estis direktoro de la eldonejo KOKO kaj kunredaktoro de la kultura revuo Norda Prismo. Li abunde verkis originale poezie kaj proze kaj kontribuis al La Nica Literatura Revuo, Literatura Foiro, Monato kaj Fonto. Li estis ankaŭ diligenta tradukanto el la dana lingvo. Liaj verkoj estis multe influita de liaj vojaĝaj spertoj en pli ol sepdek landoj. Lia poemo Frua mateno en Sarajevo estis premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1954.

La verkoj de Poul Thorsen estas diversaj. Lia unua libro (1948) estis informa verko pri lia hejmlando: Faktoj pri Danlando. Kvar jarojn poste aperis lia Bibliografio pri dana literaturo tradukita en Esperanton. Lia unua poemlibro, Rozoj kaj Urtikoj, poemoj originalaj kaj tradukitaj, aperis en 1954. En 1956 aperis liaj tradukoj de la satiraj poemetoj de Piet Hein, kiu nomis sin Kumbel, kaj en 1960 Thorsen mem aperigis faskon de samstilaj poemetoj sub la titolo Pluk imite al la dana Gruk. En 1963 aperis la poemaro Sen paraŝuto, poemoj originalaj kaj tradukitaj. Pasis pli ol du jardekoj ĝis la apero de komuna volumo de poemoj de Thorsen kaj Marjorie Boulton titolita Du el (1983) kaj post pliaj dek jaroj aperis lia proza verko Stokita vino. La lasta libro de Poul Thorsen aperis en 1996, liaj rememoroj sub la titolo Babile kun mi mem. El tiuj oni klare konstataŭ lian personan evoluon kiel esperantisto, ke “transnacia lingvo grave ŝanĝas la karakteron de sia uzanto”.

Poul Thorsen estas verkisto simpatia, kiu esprimas siajn temojn rekte kaj sendevojiĝe sen

tendenco konfuzi la leganton. Li estas laŭnatura humoristo, kiu malofte perdas oportunon surprizi per bonhumoraj sintenoj. En poemo En Grekio II (aperinta en Norda prismo 1968) li priskribas sian viziton al la fonto Kastalis ĉe la monto Parnaso por akiri poetecon per trinko el tiu fonto, kiu laŭ greka mitologio donas poetan inspiron. Li finas la poemon konforme al sia bonhumora karaktero:

*Piede de la Parnasa monto
effluis la Kastalis-fonto,
laj laŭ pagana interpreto
la gutoj plaŭdas pri sekreto:
Se vi la fridan akvon trinkas,
la vulgarismon ĝi estingas,
poeto iĝas vi kaj restas –
Parnaso kline mem atestas.
Humile antaŭ la Kastalis
por trinke mi genue falis.
Sed tiam tra cikada eĥo
surdigis min azena bleko.
Tuj poste ŝafa grego aris
kaj sanktan akvon tragargaris.
Decidis mi piedojn lavi
ol tiajn gekolegojn havi.*

Poul Thorsen havis preferon pri la bonhumore satira poemo. Sed li ankaŭ sciis melankolie kanti elegion:

Madrigalo

*Laŭ vojo stumblas laca grandaĝulo
kun dorso kurba kiel olda kverk’.
La faltoj faskas ombre de l’ okulo,
kaj dolĉe vokas dormo de la ĉerk’.
Muelas monda muelil’ kruela –
ne ĝenas ĝin la ĝojo nek la ĝem’
aŭ via sento en moment’ malhela:
Tro baldaŭ ŝajnos vi klinita kverko mem.
Kaj kiel roso peza en mateno
nun pene flugas tristo el la sin’,
ĝis la knabeto stumblas tra l’ ĝardeno
kun florbukedo por ĝojigi vin.
Admonojn tuj forgesas vi severa,
renkontas lin pro floroj ĉirkaŭprem’,
kaj lia korpo verga kaj tenera
konfirmas, ke vi iam estis tia mem.*

Ferenc Szilágyi, la cefredaktoro de Norda Prismo, iam nomis Poul Thorsen “nia plej serioza humoristo”.

Ne malpli Poul Thorsen estas memorata kiel ĉiam aktiva esperantisto ekde siaj junaĝo, instruanto de la lingvo, senlaca tradukanto kaj informanto pri sia patruja kulturo kaj fondinto kaj oficanto de diversaj kulturaj entreprenoj.

Artikolo verkita por Juna amiko, aŭgusto 2014

Fonto: <http://literaturo.esperanto.net/tekstoj/ragnarsson/thorsen.html>

de Baldur Ragnarsson

Kataj Historioj

verkis kaj sendis Elena Popova el Bulgario

16. AMO AL FIŜOJ

Iu metis tablon intence sur la bordo de la lago, kvazaŭ por provi la agojn de la vizitantoj kaj amuziĝi. Ĝi estas alta kaj estas nur du fiŝoj en la telero. la vizitantoj estas kato kaj longkrura birdo kun longa beko. La kato pensas: "Kiel mi povas manĝi, kiam la tablo estas tiel alta, mi malkomfortas, mi povas sufoki. Ĉu mi petu tiun kun la longa beko puŝi ĝin al la tero? Kaj se ĝi, anstataŭ helpi al mi, rapide englutus ĉion?"

La birdo ankaŭ pensas: "Kia malzorgemo - ili metas la fiŝojn sur malprofunda telero... Ĉu mi ne helpu la katon manĝi, kaj mi iru kapti fiŝojn rekte de la lago ...? "Kion ili faros?" - La kelnero pensas, kaŝe rigardante ilin. Dum ili rigardas la porcion kaj pensas, la fiŝoj en la lago eksciis pri la danĝero kaj fuĝas pro timo.



17. ĈERCO?

Papilio sidiĝis sur la korpo de kato. "Mi ripozas kaj forflugos..." - "pensas ĝi. La kato tremas timigita. Ĝi ne komprenas la agon de la papilio, eĉ

ne scias kiu estas sur ĝia dorso. Kio iĝos?"



18. MEMSENTO

- Kiu diras, ke mi estas sovaĝa? Mi, tiel bela, preninta la kolorojn de ĉiuj sezonoj? Homo, dankon pri via donaco kaj venu denove! Pli bone, prenu min, mi estas bona, mi amos vin, mi ronronos ĉirkaŭ vi en via korto aŭ ... lito. Ĉu multe mi volas? Mi atendas vin, bona homo!



19. KATO KAJ LILIO

La kato sin miras: "Kia bela floro! Ĉu oni ĝin manĝas? Se ne, pri kio estas ĝia beleco? Ĉu ĝi estas drogherbo?..."

La turisto rigardas kaj ankaŭ pensas: "La floro ne havas intereson al la mondo de la aliaj, ĝi havas mision - ĝojigi per beleco. La kato devas multe lerni, ĉar ĝi ne

komprenas la mondon de la aliaj vivaĵoj kaj ne scias, ke sen ili ĝi ne povas vivi. Sed ĉu ni, la homoj, komprenas ilin?"



(daŭrigota)



verkis kaj sendis **Elena Popova** el Bulgario la bildojn desegnis **Hori Jasuo** el Japanio

Pro plendoj multaj de popol'
 Pri maljusteco kaj arbitra vol'
 De riĉaj homoj — la Leono
 Ekiris por esplor' de tuta regiono.
 Samtempe la Kampul' ĉe varma flam'
 Intencis fiŝojn friti sur la pato.
 La fiŝoj tremis pro varmego jam
 En la atend' de morto sen kompato.
 Jen al Kampulo kun minaca ton'
 "Vi kion faras?" diras la Leon'.
 "Potenca reĝ!" respondis la fripon':
 "Mi estas estro de popol' rivera
 Kaj tiuj — delegitoj apud mi,
 Por la salut' alvenis ĉiuj ni,
 Al via Moŝto plej supera".
 "Nu, kiel fartas ili en river'?"

"Regnestro granda! Regas nur prosper'
 Kaj ĉiutage laŭtas nia preĝo
 Pri via longa viv', potenca reĝo."
 (Kaj fiŝoj sur la pat' baraktis en sufer').
 "Sed diru vi, por kia cel'
 La vostojn ili svingas tiel treme?
 "Ho, saĝa reĝ! Pro ĝojo kaj fidel'
 Jen ili dancas tre dankeme."
 La bruston de Kampul' eklekis la Leon',
 La fiŝojn en dancad' rigardis kun impon',
 Kaj plu ekiris li tra sia region'.

verkis **Ivan Andrejevich Krilov** (1769-1844) Rusio
 tradukis Sergej Grigorjeviĉ Rublov (1901-1979)
 Ukrainio

el la literaturaj paĝoj de Monda Asembleo Socia (MAS)

tradukis Vilhelmo Lutermano el Kubo

Boto Ŝtraŭso¹: Pri amo

Historioj kaj maloj

Fabeloj pri viro kaj virino

Amakcidentoj

Ŝia letero okaze de edziĝo

Vi, mia viro, hodiaŭ edziĝos al alia virino. Mi ne povas esti invitita, sed leteron vi ja ricevu de mi. Invititaj estas ĉiuj tiuj, kiuj ĝis antaŭ nelonge estis niaj komunaj amikoj, eĉ se ili estis pli viaj amikoj ol miaj. Tiel ili do venos al vi kaj festos kun vi, kvankam, mi scias tion, iuj estas inter ili, kiuj iomete hezitas kaj ne pretas tiel rapide kutimiĝi al tio, ke ĉirkaŭ vi tiom multe ŝanĝiĝis.

Ne, mi ne volas ŝanceli vin, mia unusola amiko. Mi ne povas diri, ke estas bone, kiel okazas. Ankaŭ ne povas diri, ke tio prefere ne okazu. Ĉar tio doloras min. Sed ĉu tio ankoraŭ gravas? Tio ne estas la tago, en kiu vi demandu vin, ĉu vi bone agas aŭ ĉu vi trovis la 'ĝustan' - mi tute certas, ke ŝi estas la 'ĝusta'. Vi faras ŝin tia. Mi ja bone konas la povon de viaj influoj, la malŝparemo de via patreco forta koro - ĝi grandigas ĉian estaĵon, kiun vi amas. Nur demandi vin vi foje povas - singarde! -, ĉu vi entute serĉis iun kaj ne pli ĝuste tuj bezonis iun, por ne fali ...

Min vi neniam petis edziniĝi al vi. La donacon de formalajtoj, al kiuj vi lastatempe pretas, nun iu alia

rajtas akcepti. Ankaŭ al mi plaĉintus de tempo al tempo ricevi de vi iomete da favoro, iomete da bela ornamaĵo. Sed verŝajne ni estis tro viro kaj virino, tro elradikiĝis el unu radiko, el unusola kreskaĵo kaj ne povis geedziĝi. Tiam, kiam ni renkontiĝis, tio ankaŭ ne estis kutima inter la maltrankviluloj. Tiam oni multe fieris pro la necesaj 'regulorompoj'. Kiu povis antaŭvidi, ke ili, la reguloj, tiel rapide resaniĝos de siaj rompoj!

Mi vundis vin kaj estis senpripensa. Vi riproĉis al mi malvarmecon kaj malicon. Sed, kiam mi renkontis tiun viron, mian amanton, mi ne pensis pri vi. Mi ne havis dubon, ke mi ne trompis vin, mi sciis, ke mi ne plu apartenis al vi, ke mi estis definitive disigita de vi. Fine mi estis punita sufiĉe kruele. Mi tute ne ekkonis lin. Mi amis lin same petegante, same posedavide kaj kun la sama sinofero, kiel mi estis aminta vin. Li komplete anstataŭis vin, kaj mi estis blinda por tio, ke tio ne estis vi, sed nur, kiel baldaŭ evidentiĝis, fremdulo, preterpasanto. Mi kredas, ke li volis nur vidi mian nudan teruron. Li volis vidi nur iun, kiu ne povas kompreni ...

"Kiaj jaroj!" skribas ŝi.

Neniam mi komprenis pli bone, kion signifis vivi ĉe via flanko, batali, maturiĝi, suferi, lerni, ol ĝuste nun, kiam ĉio ĉi estas nerevokeble pasinta. Devas esti pasinta. Tiu ĉi tranĉo profundas, tiom ke parto de mia animo restos por ĉiam detranĉita de mi, kaj mi povas teni ĝin antaŭ mi kaj rigardi kvazaŭ la internon de fremdulo. Mi konas nun mian vojon; kaj ankaŭ tiun,



kiun mi ekde nun iros sola. Mi scios elteni mian pasion, miajn erarojn kaj miajn malvenkojn. Sed ili ne povos plu formi min, ili ne plu pelos min en la angoron kaj malcertecon, en la dolorojn kaj sindonemon, kiel ja okazis kun vi, kiam mi devis ĉiutage denove pruviĝi taŭga, por daŭre ekzisti vide al via serioza superforto. Mi multe suferis pro tio. Sed pro tio elkreskis ankaŭ la forto, kiu iun tagon permesis al mi, ja ordonis al mi, neprigis malligi mian vojon de via.

Malmultajn tagojn, antaŭ ol vi sigelos per via granda festo nian fieran kaj tristan historion, mi sidas ĉe la lampo kaj skribas tiujn rapidajn vortojn, kiuj liberigas ĉion al vi kaj tamen ŝpinas doloran komploton kontraŭ la subpremo de nia tempo, kontraŭ la fera repuŝado kaj forgesado, kiun vi preskribis al vi. Tiu ĉi letero celos postuli nenion, neniel kondamni, klarigi aŭ plendi, sed nur esprimi unu solan grandan miron pri tiu komuna vivo, kiu nun estas superrigardata, ekkonata kaj honorata; kaj ĝi finos per la diskreta promeso, la diskreta ordono: je la fino estos ekzistintaj nur ni. Neniu alia.

Tio ne estas io, pri kio mi devus malami vin. Sed ekzistas tiu profunda miro esti apartenita al viro kaj ne havi infanon de li. Tion vi ne komprenas. Sed mi, amiko, donis al vi mian vivon kaj havas nun nenion, nenion en miaj brakoj. Mi ne ricevis vivon de vi, neniun kiu kreskos trans la mian, kiu mem rektiĝos kaj en ĝojiga maniero superfluigos min. Nun kelkfoje tiu monstra rezigno brulas en la tuta korpo. Nun mi sentas ĝin kiel peko, kiel forpuŝon. Ni ja ne havis tempon por infano. La profesio, la malfacilaj komencoj, ĉiam io, kio kontraŭis tion. La frukto diligente disparoliĝis inter niaj lipoj. Ĉu mi povis scii, tiam, kian maljuston mi konsentis, ĉar mia propra, plej profunda volo ja apartenis al vi?! ... Sed trankvile, trankvile. Edziĝletero, ne plorkanto. Mi ja rerektiĝos. Atendu nur kelkajn liniojn ... Ĉar, sciu, ne estas juste ke mi maljuniĝis kun vi kaj nun havas nek vin nek estaĵon en kiu ni restus unuiĝintaj. Ne justas, ke vi kun via severa saĝeco povis tiom devojigi min de mi mem. Kaj ke estis grava eraro, ke mi en tio sekvis vin, tion mi sentas kun tuta forto nur nun, kiam mi havas nenion alian ol tiun 'viron de mia vivo', ĉe kiu mi sensave alkroĉiĝas, ĉe tiu neniualia, kiun mi ne plu vidas kaj kiu tamen estas mia ĉio. Ne timu, mi ne persekutas vin. Mi lasas vin tute trankvila. Ne timu, tiu ne estas la monologo de malsana soleca virino. Al vi, al vi mi skribas! Eĉ sciante, ke vi neniam respondos al mi ... Sed mi elvokas vin, mi revivigas vin, por vivi kun mi, kiam ajn mi deziras tion. Mi trovis la vortojn - vi ne eskapos al mi ...

Vi. Per tio mi komencas. Per tio mi komencas pensi, senti, spiri.

Eble vi pensas, ke tiu ĉi letero celas esti nur la senfina digresio de mallonga krio: 'Haltu! Mi venas! Atendu! Ne faru!' ... Ne. Faru. Mi ne venos. Mi ne plu venos.

Eble tio ne sufiĉas al vi, sed mi nomas vin nun prefere 'kunulo', kaj kion mi pleje malhavas, estas via mano. Mi iras sole kaj iras ĉiam pli profunde en tiun novan fremdan landon, kiun la malproksimiĝo de vi malfermas al mi. Eble estas mia fiero, kiu ŝatus montri al vi ĉion ĉi novan, kiun mi nun vidas kaj sentas sen vi; eble estas ankaŭ la disŝirita pakto de niaj komunaj paŝoj, kiuj frapetas kaj resonas, kiam mi envojiĝas; la pariĝo de niaj demandoj kaj respondoj, kiuj ne ĉesas generi en mi generaciojn da posteuloj. Mi certe neniam genuis antaŭ vi, sed jes ja en vi. En via riĉa esto, kaj estis okupita¹ de ĝi, ĉirkaŭita, plenigita ĝis super la rando de la lipoj. Sed hodiaŭ mi scias, ke tio ne estis malforto, sed la tuta preteco al interŝanĝo de fortoj, ĉar ankaŭ mi donis kaj ne nur prenis. Mi estis la ritmo, vi la preta frazo. (Ĉar kun ĉia saĝeco kaj vortabundo, ĉu fine la viro ne estas nur la glosa aŭ la balbutisto de la virino?) Tiel mi portas almenaŭ vian eston en mi kaj multajn viajn vortojn, de kiuj mi ne povas seniĝi. Sed mi ankaŭ ne volas seniĝi de io, kio senkontestible apartenas al ni ambaŭ. Mi atingis la celon de mia seniĝo kaj estas nun liberigita de ĉiaj liberigoj. Mi gardas tion, kio estas malantaŭ mi, kiel valoran kaj karan trezoron. Kelkfoje mi pensas, ke mi foriris, nur por tiel riĉiĝi je vi. Kion mi do donus por via korpa ĉeesto? Certe ne la riĉaĵon kaj kapablojn² de kaj al miaj malhavoj, kiujn mi dankas al vi. Se vi venus, vi prenis de mi la plenumon, en kiu mi nun vivas kaj revivas - ĉion tion, kiu iam estis, la tuton inter ni, al kiu nenio aldonindas.

Tamen, tamen ... mi volas nenion pretersilenti al vi ... mi koncedas, de tempo al tempo, la kruda doloro, la sanga, avida, deĉenita malhavo, kiu agresis min kvazaŭ sovaĝa birdaro, volas rabi al mi la trezoron, mian karan perdon, volas min disŝiri ĝis mi estu nura karno, korpo, haŭto kaj ventro, kaj ne memoro! ... Mi kuŝas rigida akre maldorma la plej multajn noktojn, kaj la manoj malvarmas, kuŝas apud mi kiel en tombo. Ĉu varmo koaguliĝas kaj buliĝas ĉirkaŭ la koro ... Kie li estas? Kial li ne venas? Li ja scias, kie mi estas ... Surprizon, mirakleton mi ja ankoraŭ valorus! Sube sur la strato li devus sidi antaŭ la kafejo kaj ridi, ke li povas tiom surprizi min. Jes, mi parolas pri li. Ĉi-kaze pri li. Se vi pardonas. Pri li, kiu ne meritus la nomon 'la alia'. Temas, kiel vi scias, pri malinda kovardulo - kaj aliflanke pri la amaraj pasioj de solkuŝa³ virino, kiuj ankaŭ estas io sankta, laŭ mi. Vi ja ne scias, kiel terure estis ... La ebriecon mi devis lerni. La diboĉcon, la mizeran manion, la senapogan humiliĝon. Mi lernis

malŝati min mem kun frido kaj trompi min kun fio, kiel mi neniam povus kontraŭ alia homo. Mi vestis min kaj pimpigis min kiel deksepjarulino ferianta en Hispanio kaj senpaŭze la mallongan aventuron. Mi spertis min tiel senformiĝinta, tiel sen resto da teniĝo, koto kaj tretita kiel stratulino el plej malkara medio. Mi ofendis miajn lastajn amikojn kaj perfidis unu kontraŭ la alia.

Mi disipis monon por akiri la akompanon de iu ridinda muskolvantulo⁴. Mi kraĉis sur tapetojn kaj pisis en ŝtuparejoj. Mi batalaĉis kun taksistoj kaj sputis en la vizaĝon de vendistinoj. Mi estis plene kaj tute fia, malmorala kaj neeltenebla. Malbela kaj perforta. Kaj per ĉio ĉi mi volis puni min. "Mi ne meritas esti amata!" kriegis ĉiu mia abomenaĵo, "tretu kaj perfortu min kaj poste ĵetu min en la obskuran forlasitecon!" Sed kiom

ajn da bavo kaj veneno mi eligis, mi ne trovis trankvilon, modeston.

(daŭrigota)

<http://vlutermano.free.fr/Strauss4.html>

¹ *Botho STRAUSS (naskiĝis la 2-an de decembro, 1944 en Naumburg) estas germana aŭtoro de rakontoj, romanoj, dramoj, eseoj kaj filmscenaroj.*

elgermanigis **Vilhelmo LUTERMANO** el Kubo

*** publikigita kun permeso de la tradukanto ***

Graveco de la sociologio

Jen epizodo, kiun mi iam travivis, kaj kiu estas vere tipa kaj signifoplena. Ĝi pravas ke oni ne, tute ne, fidu je la burĝoj (Tiel inkluzive la instruistoj. Precipe !), do je tio, kio fariĝis la tielnomataj "maldekstraj" partioj kaj ilia sekvantaro !!!

Estas antaŭ kelkaj jaroj (temis pri datrevena festo de la Socia Programo de la Rezistado, do 2004?) kiu estis aranĝita de ATTAC*, la loka filio de la Asocio Attac (tre timema asocio ! Ĉar ĝi kontentiĝas admoni por "Tobin Imposto" kiel parto de kapitalismo konservita, kaj kiu nur utilus por helpi la Trian Mondon (kiu estus multe pli helpata se ĝi ne estus submetita al la diktatoroj de la Monda Banko kaj ĝiaj" ĝustigaj programoj" !!) Estis organizitaj en la "Domo de asocioj" projekcio de filmo pri la Socia Programo de Rezistado.

La publiko konsistis preskaŭ nur el instruistoj, tiuj kiuj konsideras, ke per la graco de ilia universitata diplomo, ili estas pro Dia Rajto je la flanko de la Belo, la Vero kaj la Bono ! Kaj ĉar LA BONO estas la maldekstro (jes ! Ĉi tio estas ilia nova difino kiun ili fakte havas de la maldekstro...). Do ili estas "maldekstruloj" - Quod erat demonstrandum (latina : Kio Estis Pruvenda) - Eĉ se ili havas dekstremajn spertojn, zorgojn kaj ideojn fakte ! Ŝajne, mi eble estis la sola ne-instruisto ĉeestanta. Tial per amikuma retismo, instruistoj sentis sin devigitaj iri al ĉi tiu projekcio !

Je la fino de la filmo la organizantoj diris, laŭ la nuna modo al la spektantoj, grupiĝi en rondojn de pli-malpli dek homoj kaj diskuti inter si pri tio, kion ili vidis, tiam "raportonto" venu diri al ĉiuj la rezultojn de la diskuto de sia grupo.

Do mi trovis min en grupo formita krom mi el nur instruistoj. La unua demando (ĉar ili eĉ faciligis la laboron !) estis "kion pensigis al vi tiu filmo? » Nu, ĉi tiuj instruistoj (pri kiuj oni supozus, ke ili estas homoj

verkis kaj sendis Roland Platteau el Francio

kiuj havas la kutimon paroli publike ! Kaj kiuj faris altajn universitatajn studojn, ĉu ne ? Kaj plenumis ekzamenojn, mastreco-memuarojn, disertojn) restis paralizite mutaj sur siaj pugoj ! Ĝis unu el ili finfine prenis sian plej bonan kuraĝon per la du manoj kaj diris kun inspirita tono "Nu por mi ĝi elvokas ideon pri rezisto" Jeees.... 'stas ĝi, ... 'stas ĝi'.. (4-jara infano dirus la samon! Kaj 6-jara infano estus respondinta al li "Hej balano ! Tio estas la titolo !" Kaj post tiam ili ĉesis provi paroli pri la filmo, kiun ili venis por vidi (...) sed pri temoj, kiuj vere interesas ilin : la kolegoj ! la klaĉoj de la kolegio ! La malbonkonduito de la adoleskuloj ! Ilia kapitaligita pension-plano (ŭaŭ ! Do ili subskribis kapitaligitan pension-planon !? Ĉu tio ne estas la "granda satano" kiun malamas kaj kritikegas ĉiu maldekstrulo ??) Kaj tiam fine unu el ili leviĝis pardonpetante ĉar li ne povas resti plu: li havas rendezuon kun advokato, ĉar li volas fari tribunalan plendon kontraŭ siaj najbaroj, kiuj faras tro da bruo (...) vere jen estas la ĉerizo sur la kuko !

Nu, ne necesas detalaj komentoj, mi konjektas, se estas tio la "maldekstro" se ĝi estas formita el ĉi tiu aliĝintaro (mi ree memorigas : eĉ ne unu proleto ĉeestis), ni estas sur aĉa vojo

verkis kaj sendis **Roland Platteau** el Francio





Hundoj

„Bonan matenon!
Hodiaŭ estas mia vico.
Temas nun pri
nekredeblaj rakontoj pri
hundoj“, proklamis Jens.

„Pri tio mi
scivolemas. Normale mi
pensas, ke hundoj nur
kaŭzas problemojn.
Kiom ofte la fihundoj uzis
la herbejon antaŭ nia

domo por feki tie?“, lamentis Gerd kaj daŭriĝis la plendadon. „Mi tute ne scias, kial tiel multe da homoj dorlotas hundojn. Mi ne emus fari tion. Se vi estas hundoposedanto vi ja devas ĉiam kolekti la fekaĵon. Kiel abomeninda!“

Kaj ankaŭ Karl plendis: „Ili nur kolektas la fekon, se iu estas en la proksimeco. Mi ofte registris tion. Se ili sentas sin neobservataj, ĉiu simple ne zorgas pri la malpuraĵo.“

Al tiu temo Jens ne reagis, ĉar li ne preparis ĝin.

„Mi nun komenciĝas. Verdire, mi planis rakonti al vi ion pri bestoj. Sed pri kiaj? Estas tiom multaj. Kaj hieraŭ vizitis nin nia filo kun sia familio. Ili havas etan hundon, ĝi estas terhundo de Jack-Russel. Tial mi nun elektis la temon 'hundoj'.

„Jes, tiaj bestetoj estas vere inteligentaj. Mi ankaŭ ŝatas ilin. Jack-Russel-hundoj estas vere simpatiaj. Kiam mia bofilino vizitas nin, ŝi ĉiam venas kun tia hundo. Ĝi unue kuras en la kuirejon kaj serĉas panerojn sur la tuta planko. Tiam ni ne bezonas balailon“, komentis Rudi.

Nun Jens povis komenciĝi. Unue li klarigis por kio oni uzas hundojn. Ekzemple kiel spuranta hundo, gvidhundo, ĉashundo, paŝtista hundo, gardhundo. La plejmultoj estas verŝajne simple kunuloj de la homo. Laŭdire ekzistas ĉirkaŭ ses ĝis ok milionoj da hundoj nur en Germanio.

„Ĉu vi scias, ekde kiam la homo havas hundojn kaj kiel ili fariĝis hejmbestoj?“, demandis Karl.

Jens ne pretigis sin por ĉi tiuj demandoj. Tamen li povis doni bonan respondon.

„Mi pensas, ke la homoj jam tre frue amikiĝis kun la prapatroj de la hundoj, estis la lupoj. Verŝajne antaŭ pli ol 10000 jaroj. Sed certe estis la lupoj, kiuj elektis homojn kiel partnerojn.“

Tiam Jens rakontis pri filmo de hundeposedanto el Alasko. Li promenis kun sia hundo. Subite li registris, ke nigra lupo fikse rigardis ilin de malproksime. Sed tiu

lupo ne estis malamika. Ĝi eĉ ludis kun lia hundo. Poste li daŭre restadis en la proksimeco. Povas ja esti, ke niaj prapatroj spertis similan situacion. Lupoj estas tre scivolemaj bestoj. Kiu scias? Eble sola lupo estis iam forpelita de sia luparo. Post tiam li simple serĉis kontakton al homoj.

„Eble tie troviĝis bongusta rostita porkaĵo“, komentis Gerd.

„Mi pensas, ke la porkoj iĝis hejmbestoj pli poste. La hundo estas verŝajne la unua hejmbesto de la homo. Kaj niaj prapatroj kompreneble preparis kaj rostis la viandon de la aproj“, aldonis Jens kaj daŭriĝis „Ĉu vi sciis, ke hundoj ne nur povas detekti drogojn kaj ekplodaĵojn per sia nazo? Hundoj povas eĉ flari, ĉu iu havas kanceron.“

En la jaro 2010 estis farita studaĵo, en kiu trejnitaj hundoj devis detekti kanceron. Tiuj hundoj flaris specimenojn el elspira aero. Dum tiuj eksperimentoj la hundoj sukcesis en 72 procentoj el la kazoj. Do, el tio oni povas konkludi, ke en la elspira aero de la malsanuloj estis specifaj substancoj. Nun la sciencistoj provas detekti tiujn markilojn por kancero per novaj aparatoj. Sed ili ankoraŭ ne sukcesis.

Rudi estis impresita. „Ne, tion mi ankoraŭ neniam aŭdis. Sed mi scias, ke hundoj havas multajn kapablojn. Antaŭ nelonge mi spektis raporton en televido pri hundo, kiu promenante kun sia posedanto kolektas rubaĵon. Ŝajnas, ke tio estis granda ĝojo por la besto, trovi kaj alporti la botelojn kaj skatoletojn al la rubujo“.

„Hundoj vere estas inteligentaj“, emfazis Gerd. „Oni povas trejni ilin por helpi dum hejmlaboro.“

Jens nun daŭrigis sian paroladon. „Hundoj ne nur estas inteligentaj. Ili havas propran animon. Spektu nur tiun kortuŝan filmon ĉe YouTube, kiun mi vidis.“

Tiu filmo rakontis pri hundo, kiu ĉiun tagon trifoje sopire rigardis tra la fenestro. La posedantino miris pri tio. Finfine ŝi eltrovis, ke malantaŭ fenestro de la najbara domo sidis kato, kiu same gapis tra la vitraĵo. Dum multaj semajnoj la posedantino de la hundo observis tiun strangan fenomenon. Sed unu tagon la hundo ŝanĝis sian sintenon. Li ne plu sidiĝis ĉe la fenestro. Nun li aspektis sen ĝojo kaj preskaŭ ne plu manĝis. La virino vizitis bestkuraciston. Li ne trovis malsanon. Sed li demandis ĉu lasttempe okazis ŝanĝo por la hundo.

Vere, sur la fenestrobreto nun troviĝis kelkaj florpotoj. Tial la kato ne plu povis uzi sian kutiman lokon sur la fenestrobreto. Kaj tial ne plu eblis ĉiutagaj rigardoj al la hundo de la alia flanko.





Bayram Karaboli

(daŭrigata)

Kapo Alushi, ŝanĝiĝis subite kaj komplete. Retiriĝis kvazaŭ sin defendus de iu abrupta frapo, sed momente konsciiĝis.

-Ci mensogas- kvazaŭ kriante rigardadis ŝin, tre koncentrite, klopodante eklegi la veron en ŝiaj okuloj.

-Mi ne mensogas- diris decideme ŝi kaj daŭrigis- Hodo Mati scias jam ĉion. Kune ni estas aranĝintaj la kaptilon. Liaj homoj estas alvenantaj.

Kapo Alushi ĵus aŭdinte tiun nomon, tuj eksidis surlite kvazaŭ kelkiu estis frapinta lin malantaŭ la kapo. Iom enpenŝiĝis kaj demandis:

-Ĉar ci estas aranĝinta la kaptilon, kial do diras pri tio al mi?- kaj denove estis rigardante ŝin al la okuloj suspekteme kaj atendis senpacience respondon.

-Eĉ mi ne scias kial. Eble mi ne kapablas fari malbonon al kelkiu, kvankam vi meritas tion. Sed mi estas certa ke vin suferigos kelkiu alia.

-Mi ne kredas cin- provokis li.

-Tiam restu por ke provu- diris Vera kiu nun sentis sin tute venkinta.-Ene de kvaronhoro ili estos ĉi tie. Ili posedas ankaŭ ŝlosilkopion- tiom diris ŝi kaj rigardis la manhorloĝon.

-Kion ci diros al ili, kiam alvenos?- demandis maltrankvile nun la ĉefo de departemento.

- Se mi estos sola, mi diros ke vi pentis kaj ne alvenis.

- Dankon- diris Kapo Alushi kaj ekstaris haste kaj eliris. Sed haltis ĉe la pordo, revenis, rigardis Vera-n humile kaj diris- Ĉu ci ĝisfinos ĉi tion por mi?

-Kion?- demandis Vera.

-La protekton. Kion ci diros pri la ŝlosilo?

- Mi maljesigos. Mi fermos ĉi aferon. Neniu volas embarasojn. Estu trankvila.

-Dankon- rediris li kaj foriris kiel batita hundo.

Vera vidis lin el la fenestro forirante kaŝe kaj haste.

Ŝi sentis sin elĉerpita kaj eksidis sur seĝo. Ŝin konkeris la malĝojo kaj la larmoj fluadis spontane. Ne estis ĝojaj larmoj pro la venko kontraŭ potenca kaj danĝera homo. Estis ja doloraj larmoj. Dolorigis al ŝi la vundego kaŭzita tiel neatendite kaj tiel rapide en ŝia nova vivo tiom dezirata. Eble ĉi tiu vundo resaniĝus, sed certe ĝi postlasus profundan stigmaton, kiun kiomfoje ŝi vidus, la animo revundiĝus. Jes, eble ankaŭ infektiĝus kaj malboniĝus. Kiu scias?

Ŝi fermis tiun fatalan pardon kaj eliris eksteren. Forĵetis forte la ŝlosilon, viŝissian manon kvazaŭ ĝi estis teninte ion abomenindan, enspiris profunde kaj ekiris al la hejmo.

Tiun aprilan posttagmezon la ĉielo, peziĝinte pro plombaj nuboj, enverŝis maldikan kaj serenon pluvon kiel dolorlarmojn dum silenta morto. Vera eliris el la lerneja pordo, malfermis la ruĝan ombrelon kaj ekiris al la hejmo. Besa fariĝis unu jara kaj ŝi hastis por pretigi la vespermanĝon okaze de la unua datreneo de sia anĝelo. Apenaŭ ŝi paŝis dudek metrojn, ĉe la siaj piedoj bremsis severe iu "Gaz". Timegita pro plorblekado de la gumoj kaj strataj akvoj kiuj dispruciĝis ĉi kaze, ŝi ellasis teruran krion kaj la ombrelo forflugis disde la mano. El "Gaz" eliris subite du viroj kiuj ĵetis sin sur ŝin kriante: "Je la nomo de la popolo, vi estas arestita".

Dume Vera svenis, tamen ili surmetis katenojn kaj bestiece ĵetis ŝin ĉe la fotelon malantaŭe. Poste ankaŭ ili enaŭtiliĝis, metante meze la virinon svenitan. "Gaz" ekveturis antaŭen freneze, surpremis per radoj la ombrelon kuŝinta surtere, tute disrompante ĝin kaj rapidege dronis en la griza kaj humida kurteno de tiu malhela tago. Sur la nigra asfalto postrestis kiel sangomakulo la detruita ombrelo de Vera.

Alveninte ĉe la Departementa pordo, unu el la oficiroj forte manfrapis Vera-n survizaĝen kaj ŝi konsciiĝis. Du policistoj prenis n trenante, malsuprenirigis tra kelkaj ŝtupoj kaj demetinte la katenojn, forĵetis ŝin en etan, malhelanĉambron.

En tiaj kazoj eĉ al fizike forta kaj vivosperta viro povas okazi ke lin trafu koratako, aŭ apopleksio kaj mortu. Aŭ povus okazi al normala homo, pro tiu abrupta fatalo, freneziĝu. Mirinde, al Vera, debila ino, nenio simila okazis. Hazardo aŭ natura kapricio? Aŭ ion estis jam antaŭsentinta Vera?



Antaŭ du monatoj Albanio estis malamikiĝinte kun Sovetunio kaj la albana registaro deklaris sensacie sian disiĝon de “reviziisma” tendaro, kiel ĝi komencis nomi nun la socialisman tendaron. La interrilatoj estis ĉiam pli glaciigintaj. Tiu glacio estis kondukante ĝis malsupre ĉe ordinaraj homoj. Tion eksentis tuj Vera. La direktoro ne plu ridetis al ŝi kiel antaŭe. Iu kolego, surmetante kontraŭreviziisman sloganon sur la lerneja muro diris: kamarado Enver igos ĉi tiujn paroli kun si mem.

Vera preterpasanta, timegis, kvazaŭ la vortoj direktiĝis al ŝi. Enhejme oni parolis nenion pri tiu afero. Tamen, Fatmir kvazaŭ estis perdinta ion el sia karakteriza humuro. Ne pro malvarmiĝo kun Vera. Kontraŭe li karesis ŝin plie. Sed estis pli enpenŝiginta,

pli silentema. Al Vera ŝajnis ankaŭ kiel timigita.

Tio kio neniel ŝanĝiĝis, estis panjo Dilja. Iutage, revenante hejmen, preterpasis ŝin iu “Gaz” kaj kelkiu de ene, tutvenĝeme, mallaŭdis: fihundino. Malĝoĝiginte, ŝi rigardis al la aŭtilo forveturanta kaj rekonis la ciferplaton de la aŭtilo de la ĉefo de Departemento. Subite ŝin okupis timo kiu neniam disiĝis tutajn tagojn. Al Fatmir nenion diris.

(daŭrigota)

rakonto de **Bajram Karaboli**
tradukis kaj sendis **Bardhyl Selimi** el Albanio

Georga Kruco

Ĉijare (2022) oni en Malto memorigas la 80 jariĝon de la aljuĝo de la memor-medalo ‘Georga Kruco’ al ĝi far la brita reĝo Georgo VI. Ĝi alvenis al Malto la 15an de Aprilo 1942.



Dum la milito

Estis septembre de 1939. Forirante el la lecionaro ĉe privata somer-lernejo, mi renkontis la ĉefinstruistaron de mia loka elementa lernejo, kaj kiu senhalte kriis plorante: “Amikoj, jen jam komenciĝis la milito.” Kompreneble la klaĉado kaj la demandoj de la transirantoj ne mankis. Tamen Malto ne troviĝis ankoraŭ en la batala reto. Fakte ĝi estis atakita de la jaro 1940 ĝis la jaro 1942.



La alveno de la Georga Kruco

Tiam en Malto loĝis 250, 000 homoj krom 18, 000 soldatoj. La insularo estas formita el tri insuloj; Malto mem estas la plej granda. Malgraŭ sia malgrandeco, ĝi posedis grandan strategian valoron, situanta survoje al Nordafriko kaj Mezoriento. Ĝia ĉefhaveno estis sekura por ŝipoj kaj estis ankaŭ konsiderita kiel ŝip-riparejo.

Dum la lasta dua mondmilito, ĝi estis invadita de Germanio kaj Italio, tiutempe faŝistoj kaj naziistoj. La

verkis kaj sendis Carmel Mallia el Malto

unua atakanto estis Italio, nur poste aperis la Germanoj. Tiam Malto estis brita kolonio.

Ĉi tie bonvolu pardoni min pro la plurfoja mencio de tiuj ambaŭ nacioj. Nu kulpas nur la historio. Mi simple rakontas. Hodiaŭ ambaŭ landoj estas politike niaj grandaj amikoj. Ekzemple miaj personaj grandaj amikoj estas italaj esperantistoj; krome ĉu mi menciu, ke je mia aĝo mi estas studanta la germanan lingvon?

La rakonto de la dua mondmilito rilate Malton estas ĉe ni rakonto de heroeco, politiko kaj fiereco. La heroeca atesto far la angla reĝo, aŭ la prestiĝa medalo nomumita “George Cross” (Georga Kruco), estis kreita unu jaron antaŭe de la sama angla altulo por laŭdi aŭdacajn kaj kuraĝajn individuojn pro ilia braveco, heroeco kaj sindediĉo. Tiukaze la malta popolo estis konsiderita kiel kolektivo. La popolo estis sieĝita, mankis manĝaĵoj kaj suferis pro senĉesa bombardado. Pluraj lokoj de ĝiaj urboj kaj vilaĝoj estis detruitaj kaj reduktitaj al rubo, kiam la popolo pasigis horojn kaj horojn, ĉu dumtage ĉu dumnokte, en subteraj ŝirmejoj. Tamen por helpi nin, la 15an de aŭgusto, anglaj ŝipoj atingis Malton, portantaj bezonitaĵojn por daŭrigi rezisti.



La malta flago kun flanke la Georga Kruco



Postmarko de la gloriga letero de Rego Georgo VI



Postmarko kun la Georga Kruco

Dum la milito, Malto estis vizitita kaj de la reĝo kiel ankaŭ de Churchill mem, intence por kuraĝigi la popolon. Tio montris la seriozan kondiĉon en kiu troviĝis nia insularo tiutempe.

En 1942, antaŭ la rezistemo de la insulanoj, la germanoj decidis detrui Malton. Pro tio, Churchill tuj starigis la "Operation Pedestal" (Operacion Piedestalon), kiu konsistis el vasta konvojo de ŝipoj por savi la maltan insularon, solajn meze de la mediteranea maro. Estis la tempo kiam la popolo ne povis subteni sin; mankis, kiel mi jam memciis, kaj manĝaĵoj kaj municio. Pri tio mi memoras, ke, kiam la germanaj aviadiloj, kekajn



Luftwaffe

malsupre. Mankis bombojn, k.t.p.

Ĉi tiu evento estis unu el la plej sangaj bataloj de la tuta milito, ĉar el la dektri britaj ŝipoj senditaj de Anglio nur kvin sukcesis atingi la ĉefhavenon. Tio okazis pro la senĉesa bombardado flanke de ĉi tiu itala insulo sur la anglajn apudpasantajn ŝipojn. Kaj ambaŭ Germanio kaj Italio interkonsentis detrui Malton, ĉiakoste, ĉar ĝi estis la plej danĝera roko kiu blokis la marvojon al Afriko, kien ili, nome la germanoj, volis atingi; ili fine decidis detrui ĝin, kvankam sensukcese, kaj sekve senhalte ekbonbardis ĝin el laere.



La milito

Mi memoras la kuraĝon de la germanaj aviadiloj, kiuj trapasis la ankaŭ energian atakemon de la anglaj/maltaj soldatoj, manipulantaj la kanonojn brave, konvinke kaj sentime. Aliflanke la italaj aviadiloj ŝajnis timemaj kaj ili ĉiam flugis tro alte, samtempe ĵetante la bombojn ien ajn kaj returnis al Italio, eskapante el la kanonaj bomboj.

En la jaro 1941 centriĝis en Sicilio la germana aer-armeo nomumita "Luftwaffe" (pr: luftvafe). Tio estas komprenebla. Oni ne povis atingi Malton permare sen apudiĝi Sicilion.

Ĉi tie oni ne povas forgesi la kuraĝon de la petrol-ŝipo 'Ohio', akompananta la konvojon; ĝi estis tiel severe domaĝita ke ĝi eniris la havenon en nekompreneble lama kondiĉo.

Mi memoras ankaŭ la aer-batalon inter la germanaj kaj anglaj aviadiloj, serpentumantaj en la ĉielo super la konvoj-ŝipo 'Illustrious' kiu estis ankrita en la ĉefhaveno ĝuste sub la ĉefurbo La

Valeto. Vidiĝis ke la germanoj volis ĉiakoste detrui ĉi valoran ŝipon. Mi mem vidis tiun energian aerbatalon inter ambaŭ malamikoj. Mi ne volas ankaŭ forgesi menciigi germanajn aviadilojn, kiuj tiel malalte flugis super mia urbo, ke mi povis vidi eĉ la stiriston. Mi ĉiam subtere ŝirmiĝis, kun esceptoj kompreneble. Oni foje pasigis tagojn kaj noktojn subtere, tutaj familioj, unu apud la alia, foje silentemaj, foje preĝantaj, atendantaj la finon de la aer-atakojn.

La Georga Kruco poste estis enkadrigita en la malta flago, kiel memoro de la popol-kuraĝo.

Oni diras, ke la historio ripetiĝas. Tiu de la hodiaŭa Ukraino multe similas al tiu de Malto dum la lasta mondmilito.

Unu el niaj konataj poetoj, Dun Karm, kvankam ne nur li, verkis pri tiuj historiaj eventoj belegajn poemojn. Liaj versoj estas vere klasikaĵoj de la malta literaturo. El unu el liaj poemoj mi elektis la jenajn versojn, kiel fierindan laŭdaĵon, taŭgan kiel fino al la supraj informoj. Al Malto li diras:

"Vin mi plej amas; jes, vi estas eta sed via kapableco ja genia; via beleco je envi' diskreta."

verkis kaj sendis **Carmel Mallia** el Malto



La Operteatro antaŭ kaj post la milito



Esperanto-radio 100-jara

En la jaro 1920, usonanoj komencis entuziasme aŭskultadi la unuajn regulajn radioprogramojn. Du jarojn poste, samideanoj en Usono kaj Britio povis aŭdi la unuajn Esperantlingvajn elsendojn.

Ni ĉiuj scias pri la Unua Libro de d-ro Zamenhof, aperinta en Varsovio en 1887. Ĝi prezentis la lingvon Esperanto en la skriba formo. Multaj sci-volis kiel sonas la nova lingvo. Komenciĝis personaj kontaktoj.

La unua parola uzo de la lingvo okazis en 1888 inter pola esperantisto Antoni Grabowski kaj Zamenhof. Rapide sekvis pliaj provoj kaj renkontiĝoj de diverslandaj esperantistoj. Kunveno inter britoj kaj francoj kondukis al la Unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo-ĉe-Marco en 1905. Ĝis 1921 okazis dek tri kongresoj, kiuj logis centojn da Esperanto-parolantoj.

Tamen tre multaj esperantistoj – ankaŭ pro ekonomiaj konsideroj kaj izoliteco – ne povis sperti Esperanton kiel parolan lingvon. Tiun situacion ŝanĝis la Esperanto-radio aperinta en 1922. Tial ni nunjare festas la 100-jariĝon de la Esperantlingva Radio.

Rapide kreskis la nombro de radiostacioj, kiuj en siaj programoj havis Esperantajn elsendojn. En 1923 ili estis en Moskvo, Montrealo, Rio-de-Ĵanejro, Aberdeen, Birmingham, Glasgow, Newcastle kaj Bostono. Tiujare aŭdiĝis la unua publika deklaro favore al la uzo de Esperanto en radio. Tio okazis dum la Komerca Konferenco en Venecio. Laŭ deklaro farita dum tiu konferenco: “la tutmonda disvastigo de senfadena telefonio nepre postulas rimedon por superi la lingvajn barilojn kaj rekomendas la uzadon de Esperanto por komunikaĵoj destinitaj al eksterlanda aŭdantaro”.

En 1927 jam 177 stacioj en 33 landoj uzis Esperanton en siaj elsendoj. En iliaj programoj estis prelegoj, raportoj, Esperanto-kursoj, eĉ teatraĵoj kaj operoj. La elsendojn ĉesigis en 1939 la Dua

Mondmilito. Tuj post ĝia fino en 1945, ok diverslandaj radiostacioj rekomencis Esperantajn elsendojn. La Esperantaj elsendoj aperadis en iuj stacioj, dum aliaj pri ili rezignis. Ofte tio havis politikajn kialojn.

Sed Esperanto-elsendoj multis. Tion montras informoj de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. Laŭ ĝia unua raporto en 1952, dek kvin radiostacioj aŭdigis 1820 regulajn

Esperanto-programojn.

Por plia disfloro de la Esperanto-radio apartan signifon havis la ĉiutagaj - ekde 1959 - elsendoj de la unua profesia Esperanto-redakcio de Pola Radio. Dum kvindek du jaroj Pola Radio por multaj homoj estis la voĉo de Esperantujo. Ĝi dissendis de unu ĝis ses duonhorajn elsendojn ĉiutage. Samtempe ekzistis multaj alilandaj Esperanto-elsendoj, interalie de Radio Romo, Svisa Radio, Radio Zagrebo, Radio Aŭstria Internacia, Ĉina Radio Internacia, Radio Havano Kubo, Radio Vatikana kaj 3ZZZ Melburno.

En la fino de la 90-aj jaroj kaj komence de la nova jarcento multaj radiostacioj pro diversaj kialoj ĉesis dissendi en Esperanto. Aperis la Interreto kaj retaj radioprogramoj. La Esperanto-radio pluekzistas, ĉiam pli ofte utiligante la podkaston teknologion. Tion faras Pola RetRadio en Esperanto, Esperanta Retradio, parte Muzaiko. Iuj, kiel Radio Vatikana, daŭre uzas la mallongajn ondojn. La rolo kaj signifo de Esperanto-elsendoj dum la jaroj ŝanĝiĝis. Ili tamen estis kaj restas neforigebla parto de nia Esperanto-komunumo kaj -kulturo.

Barbara Pietrzak

Pri la verkinto

Barbara Pietrzak el Pollando estas esperantistino ekde sia junula aĝo. Ŝi aktivis en la pola kaj poste en la internacia Esperanto-movado, ŝi redaktis interalie la revuon Pola Esperantisto. Ŝi estas profesia radioĵurnalisto laborinta en la Esperanta Redakcio de Pola Radio kaj nun estranta la Esperanto-programon de la Pola RetRadio en Esperanto.

Novaj vortoj

deklaro: publika sciigo.

destinita: intencita.

d-ro: doktoro.

entuziasme: kun granda, emocia ŝato pri iu afero.

Esperantujo: la Esperanta mondo.

favore: prezentante aferon kiel bonan kaj utilan.

izoliteco: la stato de homo, kiu vivas aparte de aliaj, sen kontaktoj kaj ebleco komuniki.

konferenco: renkontiĝo de fakuloj, kiuj diskutas gravajn aferojn rilate al sia fako.

opero: muzika teatraĵo.

podkasto: programo trovebla en Interreto, kiun interesatoj povas kopii kaj aŭskulti per propra telefono, komputilo aŭ alia ilo.

redakcio: la labora organizaĵo (homoj kaj ejoj) de

gazeto, revuo, radio-stacio kaj simile.

rezigni: forlasi iun esperatan aŭ deziratan celon; decidi ne plu fari ion, uzi ion.

sam-ide-ano: homo kun la sama ideo, esperantisto.

sen-fadena telefonio (esprimo ne plu uzata): radio.

teknologio: scienco pri la iloj kaj metodoj uzataj en industrio por fabriki diversajn objektojn pli rapide kaj efike.

Fonto: <https://uea.facila.org/artikoloj/movado/esperanto-radio-100-jara-r292/>

Psikaj Pensoj

verkis kaj sendis Ivaniĉka Madĝarova el Bulgario

Pardon mi malfermis
por ke la amo veni.
Ĝi forkuris.

Subite falanta neĝo
kovris tutan teron.
Mia animo restis nuda.

Fermegis mi la pardonon,
por ke ne venu angoro.
Restis la soleco.

Varma aŭtuno min
allogis la ekstero.
Rapide mi vestis min kaj
sidiĝis malantaŭ la fenestro.

Sincere ŝi preĝis al Dio
senkulpigi siajn estontajn pekojn.

Entrinkis oni je malgajo glutojn
da maldolĉa vino por rekviemo.
Iu diris: "Je via sano"

Ebrie de amo ili promesis
sin al eterna fideleco.
Sekvantan tagon ili malsorbiĝis.

Li diris al sia amatino,
ke li ne povis vivi sen ŝi.
Tuj ŝi forlasis lin.

Dum la tempo de la ŝanĝo
kaj la veturo de la ŝanĝo

ŝanĝis sian direkton.

La amo estas frenezeco de la dua
ĝis la momento kiam
Intervenias al ili tria.

La viroj admiras saĝan virinon,
sed malofte edziĝas al ŝi.



verkis kaj sendis
Ivaniĉka Madĝarova
el Razgrad, Bulgario

Danke al Vi

verkis kaj sendis Vytautas Ŝilas (Vitas) el Litovio

*Danko al Patrino, instruistoj kaj E-
amikaro*

Pro la viv` infanojara
La eduko kaj favor`
Mi Vin dankas, Panjo kara,
Dankas Vin el tuta kor`!
Dank` al Vi, zorgado Via
Min favoris la destin`.
Mi treege, Bona tia,
Forte, forte amas Vin!

Dankas mi al instruistoj
Pro l` instruoj kaj egid`:
Dankas ilin pro persisto,
La klopodoj kaj konfid`.
Danke mi la vivon iras,
Certas agi per raci`.

Mi al ili bondeziras:
Ĉiam brave fartu vi!

Dank` al sort` kaj Esperanto
Renkontiĝas nia rond`.
Sonas Esperanto-kanto
Tra la tuta vasta mond`!
Dankon, amikaro nia,
Dankon por renkonto ĉi.
En la rondo familia
Agu kune ĉiuj ni!



verkis kaj sendis **Vytautas Ŝilas**
(Vitas)
el Litovio

Ŝercoj



BELA RIDETO

Kruko estas kun siaj gepatroj: Mi ŝatus foti vin per mia nova telefono.

Avino Krukegino: En ordo, Kruĉjo.

Avo Krukego ne entuziasmas: Hmf.

Avino Krukegino: Sed ridetu, Krukego!

Avo Krukego: Ne!

Kruko: Ne zorgu, panjo. Mi povas aldoni rideton per la bildoredaktilo.

Avino Krukegino: Ho, bone. Kaj dume, ĉu vi povos doni al li puran ĉemizon, kaj iom tondi liajn lipharojn....?

TELEFONO

Eta Joĉjo hejmenvenas kolerege. Li klakfermas la pordon.

Jozefino: Kio okazas, Joĉjo?

Joĉjo: Aĥ, mia samklasanino Tanjo kolerigas min!

Post momento, li aldonas: Panjo, mi bezonas propran telefonon.

Jozefino: Kial?

Joĉjo: Por ke mi povu bloki ŝin!

NENIU PROBLEMO

Kruko parolas kun sia juna bofrato, Aleĉjo.

Aleĉjo: Mi ne scias kiel solvi miajn problemojn.

Kruko: Ha, vi simple bezonas pli grandan problemon!

Aleĉjo: Pli grandan?

Kruko: Jes, pli granda problemo ĉiam forĉasas la aliajn problemojn.

Aleĉjo: Kaj poste?

Kruko: Poste, vi simple atendu ĝis eĉ pli granda problemo ekregas.

Aleĉjo: Kaj kiam ĉio ĉi tio ĉesas?

Kruko: Neniu problemo – ni mortas!!


tradukis **Rikardo Cash** el Francio
publikigita kun lia permeso

Fonto: esperanto-anekdotoj@googlegroups.com



"Sed se nur necesas kompreni sidu! staru! boju! ktp.
kial tiu libro havas 696 paĝojn?"

Krucvortenigmo



Silaba Krucvortenigmo

Skribu silabon en ĉiu kvadrato. Jen estas listo de bezonaj silaboj:

A, DA, DI, DI, E, ES, GI-O, ĜO, I, KRE, LO, MAT, NER, NO, O, PA, PE, PEN, PO, PO, RAN, SU, TI, TO, TO, TO

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Komenciĝo, starto; 3. Dato de kreaĵo; 6. Klopodo, strebo; 7. ___ komplekso (Freud); 8. En fiziko, estas la rezisto de korpo al ŝanĝo de sia movkondiĉo; 9. ___ tutmonde, agu loke; 10. Branĉo de matematiko kiu studas la nociojn de kontinueco kaj konekseco; 11.

Animala graso.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. La plej disvastigita internacia planlingvo; 2. Kontenero en la vitkultivado por kolekto de la vinberoj; 3. Agnosko, bonhavo; 4. Kolektiva; 5. Ruĝa supo; 7. La E de E=mc²; 8. Internacia Labor-Oficejo; 9. Esti alligita per unu ekstremo.

Fonto: Semajno de Enigmoj

<http://www.semajnodeenigmoj.com>

(La solvo troviĝas en paĝo 31)

Unua parto :Anekdotoj, rakontoj kaj diversajoj**Lordo kaj bovido**

Lordo Abington promenis foje tra vilaĝo proksime de Oksfordo kaj renkontis knabon, kiu trenis post si bovidon. Kiam lia lorda moŝto proksimiĝis, la knabo haltis kaj rigardis lin kun malfermita buŝo. La lordo demandis la knabon: „Ĉu vi konas min?“ — „Jes“ — respondis la kriabo. „Kiel oni nomas min?“ — „Lordo Abington“ — estis la respondo. Kial do vi ne demetas la ĉapelon?“ — „Mi volonte faros tion — respondis la vilaĝano —, se vi dume tenos la bovidon.“

Hawke

Kiam la fama angla admiralo Hawke estis ankoraŭ knabo kaj la patro uniafoje prenis lin sur ŝipon, li admonis lin bone konduki kaj aldonis: „Tjam mi esperas vidi vin kapitano.“ — „Kapitano? — ekkriis la knabo—, kara patro, se mi ne esperus fariĝi admiralo, mi ne konsentus esti maristo.

Reĝo kaj muzika instruisto

La violonisto Salomons, kiu donis lecionojn al la angla reĝo Georgo IIIa, diris foje al sia eminenta lernanto: „La violonistojn oni dividas en tri klasojn: al la unua apartenas tiuj, kiuj tute ne scias ludi; al la dua tiuj, kiuj ludas tre maibone; al ja tria fine tiuj, kiuj bone ludas. Via Reĝa Moŝto jam atingis la duan.

Leono kaj leporo

Leono favoris leporon per sia amikeco. Foje la leporo demandis sian amikon: — Oni diras, ke mizera krianta koko facile fortimigas vin, leonojn; ĉu tio estas vera? — Jes — respondis la leono —; estas konata fakto, ke ni' grandaj bestoj havas niajn malgrandajn malfortaĵojn; ekzemple la gruntado de porko kaŭzas al la elefantoj tremon kaj abomenon. — Efektive — interrompis la leporo. — Nun mi komprenas, kia ni leporoj tiel timas la hundojn.

Granda kapo de brasiko

Du metiaj knaboj, Petro kaj Benedikto, paŝis foje preter legoma ĝardeno. — Rigardu — diris Petro —, kiel grandaj brasikaj kapoj! Tute ne grandaj — respondis Benedikto, granda fanfaronemulo. — Dum mia migrado mi vidis foje brasikan kapon, kiu estis kvarfoje pli granda, ol la paroĥa domo. Petro, kiu estis kupristo, diris: — Granda estis via

brasika kapo. Sed mi foje faris kaldronon, kiu estis tiel granda, kiel la preĝejo.

— Pro Dio — ekkriis Benedikto —, por kio oni bezonis tiel grandan kaldronon?

— Kredeble — respondis Petro — por kuiri en ĝi vian brasikan kapon.

**Varma vesto**

Malriĉa franco, vestita nur per malpeza somera surtuto, promenis en bela vintra tago sur la stratoj de Parizo. La reĝo, renkontante lin, miris pro lia somera vesto kaj demandis:

— Kial vi promenas en tiel malpeza vesto?

— Via Reĝa Moŝto — respondis la franco — imitu min, kaj vi neniam sentos maivarmon.

— Kion vi faras? — demandis la reĝo.

— Mi surmetas ĉiujn miajn vestojn — estis la respondo.

SinJORINO Rothschild

Maljuna sinJORINO Rothschild, la patrino de la potenca kapitalisto, atingis la aĝon de naŭdek ok jaroj; ŝia rimarkinda spriteco kaj neordinara inteligenteco konserviĝis ĝis ŝia morto. Dum sia lasta malsano, ĉirkaŭita de la luta familio, ŝi diris al la kuracisto per petega tono: „Kara doktoro, provu fari ion por mi.“

— „SinJORINO, kion mi povas fari? Mi ja ne povas rejuniĝi vin.“

— „Ne, doktoro, mi ne deziras esti ree juna, mi deziras daŭrigi maljuniĝi.“

Konfeso

— Ĉu vi ĉion konfesis? — diris respektinda pastro al pekulo dum la konfesado.

— Ne, ankoraŭ unu peko ŝarĝas mian konsciencon: mi ŝtelis poŝhorloĝon, ĉu vi akceptos ĝin?

— Mi? — diris la ofendita pastro. — Vi kuraĝas ofendi min kaj mian sanktan profesion? Redonu senprokraste la horloĝon al tiu, de kiu vi ŝteis.

— Mi jam provis redoni, sed li ne volas ĝin akcepti; mi petegas vin, prenu ĝin.

— Ĉesu ofendi min, — diris la pastro — vi devis ripeti vian peton.

— Mi faris tion — respondis la ŝtelisto —, sed li ne volas akcepti.

— En tia okazo — diris la sankta, nenion suspektanta pastro, — mi povas senpekigi vin, sed mi insiste ordonas al vi ne ŝteli plu.

Baldaŭ post la foriro de la konfesinto, la pastro rimarkis, ke lia propra poŝhorloĝo estis ŝtelita de la hoko, sur kiu li ordinare pendigis ĝin.

Vulpo

Kuracisto havis tiel malsovaĝan vulpon, ke li lasis ĝin libera la tutan tagon, ĉar ĝi atakis neniun. Ĝi eĉ iris arbaron, sed revenis ĉiuvespere; nur nokte oni ligis ĝin al ĉeno. Foje ĝi rimarkis, ke la ĉirkaŭkolo estas tro

vasta, eliĝis el ĝi kaj iris en najbaran domon ŝteli kokon; sed antaŭ la tagiĝo ĝi revenis kaj enrampis en la ĉirkaŭkolon. Ĉiutage oni vidis ĝin ligitan al la ĉeno kaj suspektis nenion. Ĝia ruzo estis malkaŝita nur kiam ĝi falis en kaptilon de la najbaro.

(daŭrigota)

EKRA2021 - Poezio - Citruso

-- konkursaĵoj de EKRA 2021 - Razgrad

Nuntempe

Kiel malĝoja estas ĉi tiu parko...

Eĉ ne esta arbo-flaranta hundo, al verdabenoj mankas geamantoj, malaperis ludantaj infanoj ,ĝojkrioj kaj ridoj, sur granit-table en la ombro, nenie estas avo-ludo.

Kiel malĝoja estas ĉi tiu strato...

Eĉ ne hupas hastanta aŭtomobilisto,

al la vojo mankas amaso da veturiloj,

malaperis urbaj bruoj kaj preterpasantoj, fermaj estas la butikoj, nenie aperas turistoj.

Kiel malĝoja estas ĉi tiu tago...

Preskaŭ ĉiuj homoj hejme estas, aŭ ludas, aŭ televidon pasive spektas, aliaj dormas, ĉar krome estas tre varme.

Kiel malĝoja estas ĉi tiu ekzisto...

Sencela kaj enua vivo, peza koro, tiel identaj estas ĉiuj tagoj kiuj pasas, ŝajne, atendente lace la malapero de la viruso, horo post horo.

Citruso

poezio de **Cyril Vergnaud** el Tajvano

Tria premio pri poezio

EKRA2021 - Poezio - Pasero

-- konkursaĵoj de EKRA 2021 - Razgrad



Kvaranteno

Lancosimila fera stango de palisaro ruĝan balonon tenas ligitan. Al la blua ĉielo vane ĝi sopiras, vane baraktas, liberiĝi ne eblas

Pasero

Metempisikozo


Kiam alvenos la vivfino, kien ekiros la animo? Ke ĝi neniĝos samtempe Ja por mi estas nekredeble. Metempisikozo, mia revo – Estas postmorte iĝi mevo Flugi super la greka maro - Mia granda dumviva amo. Bluos la eterna ĉielo, Brilos sub mi mara senfino. , Animo ne loĝas en tombo, Animo ne fariĝos polvo.

Pasero

poezio de **Lenke Szasz** el Rumanio

Tria premio pri poezio

Dek kilometrojn for de la urbo Boljevac (La orienta parto de Serbio) ĉe la piedoj de Rtanj montego, proksime de la Gamzigrad banloko troviĝas reĝa palaco nomata "FELIX ROMULIANA".



Ĝi prezentas la plej faman historian heredaĵon troviĝanta en la orienta parto de Serbio, ĝuste en la Timoka regiono.

Ĝi ekestis fine de la tria kaj komence de la kvara jarcento de la nova erao. Do, palaco Felix Romuliana prezentas la restaĵojn de iama imperia palaco, frubicancan kolonion kaj mezepokan urbon.

Romia imperiestro Galerio Valerio Maksimiliano decidis, ke li konstru la oalacon en la jaron 305 de la nova erao kaj dediĉis ĝin al sia patrino Romuliana.

La konstruado daŭris ĝis lia morto. Survoje al la urbego Sofio li estis infektitita, kie li baldaŭ mortis. Lia korpo estis transportita al la imperia palaco, kie li estis enterigita sur la altaĵo Magura. Tie sur la Magura, lia patrino, Romuliana decidis, ke ŝi faru apoteozon laŭ pagana rito (la religia rito per kiu li estis levita kaj proklamita kiel Dion)

Tiel lia enterigo estis konsiderata la lasta pagana rito, ĉar du jarojn poste reĝo Konstantino la Granda proklamis Kristanisman.

Unu kilometron oriente de la palaco troviĝas du tumuloj kie estis enterigitaj li kaj poste lia patrino, Romuliana.

Imperiestro Galerio Maksimiliano famiĝis pro sia donita "milana edikto", kiu proklamis la toleremon al kristana religio.

Ĉu la palaco Felix Romuliana estis tuj rekonata laŭ la nomo de la reĝa patrino Romuliana?

En la 19-a jarcento, serĉante minejojn en Serbio, la germana barono malkovris la spurojn de la fortikaĵo. Poste Felix Kanic, la konata vojaĝpriskribisto vizitinte la fortikaĵon estis konvinkinta, ke tio estis Romia fortikaĵo KASTRUM, ĉar romianoj konstruadis multajn fortikaĵojn je la dekstra flanko surborde de la rivero Danubo por protekti sin kontraŭ subitaj barbaraj atakadoj venitaj

trans Danubo.

Ĉe ni, en la orienta parto de Serbio, ekde 1953 jaro niaj arkeologoj komencis esploradon de la fortikaĵo troviĝanta en ĉirkaŭaĵo de Gamzigrada banloko, proksime de la urbo Zajeĉar. Tiam estis malkovritaj gravaj kaj valoraj kulturaj artaj kaj arkeologiaj objektoj. Ekzemple: unue la malkovritaj mozaikoj asertis, ke la ĝistiam kredado pri ekzisto de Romia fortikaĵo falis, ĉar nia arkeologo, d-ro Dragoslav Srejović pruvis, ke tie fakte troviĝas Imperia palaco nomata "Felix Romuliana" laŭ la skribaĵo trovita sur la fragmento de arkivolto.

Ekstere, la palaco etendiĝas sur 6,5 hektaroj, kaj intere sur 4,5 ha.

La palaco estas trapezforma tricent foje ducent metrojn longa. Intere de la defendsistemo kun 20 turoj troviĝas la vestibloj, holoj, varmbaneoj ktp. La ornamitaj plankmozaikoj estis distingiĝantaj per formo kaj koloro, freskoj, marmoraj ĉampentraĵoj kaj skulpturoj. Ekz. la krono de imperiestro Galerio estis farita el plej pura egiptia ruĝa porfiro.


La imperia palaco estis mirinda pro ĝiaj mozaikoj, barreliefoj kaj objektoj faritaj el rozkolora kaj verda porfiro alportita el Peleponezo.

Ĝi estis la pej bele konstruita ekzemplo de Romiaj kortegoj: malnova salono, la granda salono, akvo-termoj, vestibloj, belege ornamitaj muroj kun motivoj de ĉasado kaj naturo, 20 blankaj altaj kolonoj, turoj kaj belegaj historiaj kaj kulturaj artaĵoj kaj skulpturoj: kapo de Jupitero, Herkulo, Galerio. Ĉio prezentas valoran ateston pri malfrua antikva arkeologia eltrovejo.

En la jaro 200 "Felix Romuliana" estis enmetita en la liston de mondaj kulturaj heredaĵoj.

En junio la palacon vizitis ministro de la Ministerio de Kulturo kaj Informado Predrag Marković kune kun ambasadoro de Germanio en Beogrado, s-ro Volfram Mas kaj la Zajeĉara urbestro s-ro Boško Ničić. Tiam estis prezentita maketo pri la nova vizaĝo de la restarigita orienta pordego de Felix Romuliana.

La projekton pri "Restarigado kaj konservado de la Orienta pordego de "Felix Romuliana" finance subtenis Germanio. Antaŭe tion faris Italio, Kanado, Japanio kaj akonpanis ilin ambasadorino Merry Vorlik



el Usono. Dankante al ilia monrimedo oni povis sukcese fini la projekton de restarigado kaj konservado de du tumuloj sur Magura kie estis enterigitaj imperiestro Galerijo kaj lia patrino Romuliana.

Sur la teritorio de Serbio troviĝas 8 el 17 Romiaj

Reĝoj. La imperian palacon "Felix Romuliana" oni povas kompari kun la belega Diokleciana palaco troviĝanta en Split (Dalmata urbego de Kroatujo).

verkis kaj sendis **Jadranka Mirić**
el Zaječar, Serbio

La sakramento de la komunio

Okazis preskaŭ en mia infanaĝo. Estis aŭtuna vespero kun forta vento sur unu el la in-sularaj ŝipoj. Ni ankoraŭ ne transloĝiĝis urben de nia kamp-ara somera domo, kaj mi veturadis al kaj el la urbo pro mia lernejo. Mi kiel kutime estis maldiligenta kaj devis ekzameniĝi pri kelkaj studobjektoj por esti akceptita en supera klaso. En la krepusko mi vagis tien kaj reen sur la ferdeko, kun kuspita kolumo kaj la manoj enpoŝe, pensante pri mia malprospero en la lernejo. Mi estis preskaŭ certa ke mi devos refari la klason. Kliniĝante antaŭen super la ŝiprando kaj vidante la ondojn ŝaŭmi blanke kaj la babordan lanternon ĵeti fajre verdajn rebrilojn kontraŭ la nigra akvo, io min tentis salti transranden. Tiam ja la matematika instruisto bedaŭros sian pedantemon — tiam, kiam jam estos tro malfrue.

*

Sed resti tie ekstere estis malvarme, kaj pensante ke mi jam sufiĉe frostiĝis, mi iris en la kajuton por fumantoj.

Mi ankoraŭ imagas la interioron* el varmo kaj hejmeco, kiun renkontis mia rigardo kiam mi malfermis la pordon. La lumigita lampo malrapide balanciĝis tien kaj reen de la plafono kvazaŭ pendolo. Surtable vaporis kvar viskiaj grogoj; kvar cigaroj ardis, kaj kvar sinjoroj rakontadis fiajn anekdotojn. Mi konis ilin ĉiujn kiel najbarojn ĉe la somera domo; unu direktoro de firmo, unu maljuna pastro, unu aktoro kaj unu komercisto de etaĵoj. Mi ĝentile riverencis kaj sidiĝis en angulo. Mi havis leĝeran impreson ke mia ĉeesto eble povus ŝajni superflua; sed aliflanke neniu povus ja postuli ke mi iru ekstere frostiĝante, kiam estas tiom da spaco en la kajuto. Krome mi sciis, ke mi povus tute bone kontribui al la distro se necesus.

La kvar sinjoroj ŝtelrigardis min kun certa malvarmo, kaj estiĝis paŭzo.

Mi havis dek ses jarojn, kaj mi antaŭ nelonge konfirmiĝis. Oni diris al mi, ke mi en tiu ĉi tempo havis aspekton naivan kaj senkulpan.

La paŭzo tamen ne estis longa. Kelkaj glutoj el la glasoj, kelkaj tiroj de la cigaroj, kaj la diskuto denove ekhavis vervon. Unu aparta trajto tamen frapis min: ĉiujn anekdotojn, kiujn oni rakontis, mi jam aŭdis nekalkuleblajn fojojn, kaj mi per-sone trovis ilin sufiĉe simplaj. Fiaj anekdotoj kiel konate estas divideblaj en

-- rakonto de Hjalmar Söderberg el Svedio

du ĉefajn grupojn: unu koncentriĝas precipe ĉirkaŭ la digesta procezo kaj cirkonstancoj ligitaj kun tiu, dum la dua, kiu valoras nekompareble pli multe, prefere temas pri la virino. La unuan grupon mi kaj miaj samlernejanaj delonge lasis malantaŭ ni; des pli surprizis min aŭdi tiujn ĉi maturajn sinjorojn dediĉi al ĝi sian plej vivan intereson, dum la dua, ege pli interesa grupo estis plene neglektata. Mi ne komprenis tion ĉi. Ĉu eble estis pro ia superflua respekto al mi? Ne necesas diri ĝis kia grado la suspekto pri tio min incitis. La vigla etoso de la kajuto infektis min kaj igis min entreprenema, kaj mi energie decidis meti finon al tiuj ĉi infa-naĵoj.

"Aŭskultu, onklo", mi tute neatendite diris dum silento post anekdoto, kiu estis tiel sendanĝera, ke nur la pastro ridis pri ĝi, "ĉu vi memoras tiun anekdoton kiun la ŝipestro rakontis antaŭhieraŭ?"

La "onklo" estis la direktoro; li estis bona amiko de mia patro.

Kaj mi sentime daŭrigis:

"Ĝi estas la plej amuza kiun mi aŭdis en mia tuta vivo. Mi petas vin rakonti ĝin, onklo!"

Kvar paroj da surprizitaj okuloj direktiĝis al mi, kaj estiĝis embarasa silento. Mi jam bedaŭris mian subitan kuraĝon.

La direktoro disrompis la glacieron de silento per facilanima rido, kiu estis nur malforta eĥo de la tondroj kiujn li eligis antaŭ kelkaj tagoj, kiam la ŝipestro rakontis la anekdoton.

"Hi-hi — jes, ĝi ne estas malbona..."

Kaj li ekrakontis ĝin. Ĝi estis tre spicita, kaj ĝi temis pri la virino.

La aktoro komence kaŝis siajn sentojn malantaŭ sia kutima masko de digna seriozeco, dum kontraŭe la etkomercis-to, maljuna virkapro, kiun la pekado grizigis, ŝtelrigardis min kun certa intereso, en kiu troviĝis iom da kreskinta respekto por mia persono.

Sed kiam la anekdoto komencis preni iomete maldecan direkton, ĝin subite interrompis la pastro, bonvola aĝulo kun pia kaj infana esprimo en sia senbarba maljunulina vizaĝo:

"Pardonu, kara amiko, ke mi interrompas, sed", kaj li iome-te tordiĝis direktante siajn vortojn al mi, "kiun aĝon vi efek-tive havas, junulo? Ĉu vi jam partoprenis la sank... — la komunion?"

Mi sentis ke mi sange ruĝiĝas. Mi forgesis, ke

troviĝas pas-tro en la societo.

"Je-es", mi preskaŭ neaŭdeble balbutis. "Mi konfirmiĝis lastvintre."

"Bone", respondis la maljuna pastro, malrapide kirlante sian grogon.

Kaj ne levante la rigardon li aldonis, per voĉo, kiun kvar-dek jaroj da akordigado inter Dio kaj la mondo stampis per milda tono de indulgo kaj tolero:

"Daŭrigu, kara amiko. Pardonu mian

interrompon."

*) bildo aŭ imago pri dominterno, hejma vivo k.s.

el la sveda tradukis **Sten Johansson**

Fonto: **LA KISO kaj dek tri aliaj noveloj**

Miaj hundo kaj kato

Mia prahejmloko sidas en malgranda izolita montovilaĝo de Hengnan-gubernio, sude de Ĉinio.



En nia hejmo estis nigra hundo, nomite Hejzi. laŭ akademio li devas aparteni al Ĉina Kampa Hundo. La hararo sur lia tuta korpo nigregis kaj olebrilis. Hejzi al mi tre intimis. Li ĉiam emis akompani min kiam mi bovojn paŝtis ekstere. Ja tre solece estis, ke mi sola okupiĝis je paŝtado sur monto. Feliĉe la interesa kunulo Hejzi ĉiam restis ĉe mi. Kiam mi gapadis la montajn pejzaĝojn de forejoj kaj la kurantaj nubamasojn gregosimilajn sur la ĉielo ensorbate, li ĉiam sidis ĉe mi kaj fiksigardis min per la nigraj ruliĝantaj scivolemaj okuloj kun flankenigita kapo kaj konfuza mieno kvankam sen kapablo demandi vorte. Ŝajnis ke li multe scivolemigis kion mi pensas en koro tiumomente. Tamen li faris nenion ol fiksigardi min kaj senĉese rondiradi ĉirkaŭe. Kia interesa!

Li estis mia intima amiko kaj fidela kunulo, sed mi nur povis karesadi al li la kapon kaj glatumi la hararon sur lia kolo kaj dorso kiel unikan premion kiun mi povis doni. Tamen li estis tre facile kontentigebla. Ricevinte karesadon de mi, svingante la voston kaj torde movante la korpon li petoladis ĉirkaŭ mi kun granda ĝojo jen saltante jen rondkurante kun ĝojozumado.

Hejzi foje kaj refoje kaptis kaj mordmortigis leporon surmonte kaj portis hejmen, kaj ĵetis la mortintan leporon antaŭ mia patrino. Kun plezuro ŝi ĉiam al li donis karesadon sur la kapo por kuraĝigo kaj Hejzi ĉiufoje ricevis iom da viando kaj ostoj post kuirado de la leporo kiel premion.

Ĉiutage Hejzi fidele gardis la hejmon por mastro kaj samtempe estis tre saĝa kaj komprenema. Kiam iu

verkis kaj sendis Gajo el Ĉinio

proksimiĝis al mia hejmo, Hejzi ĉiam plejfrue rimarkis kaj ekbojadis por averti sed neniam mordis. Tuj kiam mastro iris eksteren kaj salutis vizitanton, Hejzi tuj ĉesis boji kaj svingis voston, sekvis post la mastro kaj preterrigardis la gaston kaj snufadis kolektante odoron en sian kapon por rekoni aliffoje, do ĉirkaŭuloj ĉiam lin laŭdis.

Cetere, nia Hejzi rilatis amike kun nia kato Lajfuo eksterordinare. Ili origine ne estis samspeculoj, ne havis komunan lingvon, sed tamen kunvivis tiom intime kaj harmonie, ke mi tion ne bone komprenas eĉ hodiaŭ. Post atentema rememorado, mi supozas, tio eble koncernis pri afero, ke kiam la kato unuafoje alvenis nian hejmon, mia avino ordonis, ke mi manprenu la katon kaj la kato salutu la hundon per tri riverencoj. Onidire, tia cermoniema konatiĝa saluto povas fari, ke ili certe estu tre amikaj unu kun la alia poste. Vere mistere estis ke ili kunvivis jes ja tre amike kaj intime post la interkonatiĝo! Tage neniofarante, la kato petolema ludeme foje ekkaptis la vostopinton de la hundo per siaj antaŭaj piedoj kun akraj ungetoj kaj la hundo subite reage sin turnis kun movado atakonta, rimarkinte tion la kato tuj rampis la kolonon supren; la hundo nur fiksigardis la kunulon ululante sed sen rimedo atingi; la kato denove la samon faris kontraŭ la hundo kelkfoje kaj poste haltis por ripozi pro laciĝo. Tiaj scenoj min ridigas eĉ nun dum mia rememorado. Mi ne forgesos por ĉiam, ke tiujare niaj du bestoamikoj donis tiom da ĝojo kaj intereso en la malfacila epoko kaj malriĉa loko!

Plue, kutime vintre malvarmas, hundo havas sian hundneston por nokti, kaj kato noktas en kuirejo apud la fajrujo, sed nia kato Lajfuo ne faris tion. Nia hundo Hejzi ĉiam kuŝis en sia nesto dum nokto kurbigante sian korpon en hemcirklo, kaj la kato ankaŭ kurbigis sian korpon premkuŝis sub la ventro de la hundo ĝuste en la meza mezo de la hemcirklo formita de la hundo per sia propra korpo varmigante unu la alian kontraŭ la frostoj dum vintra nokto! Kia interesa agado! Vere estas malfacile kredi tion se mi ne vidus la scenon propraokule!



Hundo Hejzi ŝajnis ne timi akvon denaske kaj scipovis naĝi. Lutage, mia patrino ordonis ke mi banu la hundon en la lageto antaŭ mia domo. Do mi prenis lin en akvon kaj banis. Komence, li ŝajnis iom malkuraĝeta, kaj mi plu banis konsolante lin, tiel post minuteto, li ne plu timis kaj subite sin liberigis de mia mano sola naĝis transen kaj renaĝis cisen al mi. Post tio, li ofte naĝadis tiel per si mem en akvo por sin purlavi.

Hejzi intimis al mi eksterordinare. Ĉiufoje li akompanis min al la trajnostacio en nia urbeto, de kie mi devis veturi al mia universitato en nia provinca ĉefurbo Changsha per gastovagonaro. De mia prahejmo ĝis nia urbeto distancas vojlongo de 12-13 lioj*. Sur voje mi kelkfoje repelis lin al hejmo pro timo, ke li eble perdiĝos. Sed li ne volis kaj sekvis min plu obstine ĝis la stacio. Li sidis apud la fervojo kaj vane

fiksrigardis min forveturi per la trajno bluŝela tiel rapide, kiel elektro aŭ vento. Poste li sole revenis hejmen lace kun pendema kapo, mi supozas. Kelkajn jarojn poste, ĉe mia denova alveno al mia hejmo, la hundo nigra kurante sin ĵetis al mi de trea malproksimo kaj saltis tre alte, por ke mi karesu lian kapon. Kia aminda besto!

Tre rapide pli ol kvindek jaroj jam pasis! Poste, mia frato malpliĝa al mi raportis, ke la hundo kaj la kato ĉiuj vivadis ĝis sia natura morto. Sed mi sentas eĉ nun kvazaŭ ili vivas ankoraŭ!

* lio. Ĉina mezurunuo, egala je 536,33 metroj.

(unu el la serio de memoroj pri la hejmloko:
de Gajo Li Chuanhua el Ĉinio
verkis aprile de 1992; modifis printempe de 2022)

Pri la Serpento-insulo

Se vi sekvas la novaĵojn pri la ukrainia-rusa milito, eble lastatempe vi aŭdis pri la Serpento-insulo de Ukrainio (Zmiyni aŭ en la antikva greka, Lefki), kiu estas ia roka insuleto, kun areo de malpli ol 1 kvadrata km kaj troviĝas preskaŭ antaŭ la delto de rivero Danubo. Sur tiu insulo okazis militaj eventoj, kiuj estas ekster la amplekso de tiu revuo, sed jen fragmento el la libro "Grekoj en la Nigra Maro" de Marianna Koromila, kiu priskribas tiun insulon en la antikveco:



...

Kiam la vundita heroo Aĥilo mortis, muĝado skuis la nordan Egeon kaj terurigis la amasojn da militistoj en Trojo.

Tra la tumultaj ondoj aperis lia patrino Tetis kaj la marnimfoj Nereidoj, kiuj venis por funebri la diomorfan mortinton. Ili formis rondon ĉirkaŭ lia korpo, trenis la krion de funebro kaj kantis elegiojn kaj odojn kune kun la naŭ Muzoj. Ili daŭrigis la krion de perejo dum dek sep tagoj kaj noktoj.

En la dekoka tago la funebra fajro estis bruligita. En la tempo, kiam lia korpo brulis kaj la gvidantoj de la greka armeo partoprenis sportludojn honore al la mortinto, Tetis, lia patrino alproksimiĝis al la fajro kaj forŝtelis la animon de sia sola ido.

Ŝi plonĝis en la akvojn de Egeo, transiris la Helesponton¹ kaj la Propontison², transiris la Bosporon³ kaj, sekvante la ĉiujarajn trairejojn de la fiŝoj, kiuj iras por naski ĉe la elfluejo de la rivero Danubo, kaj atingis la neloĝatan insulon Lefki. En la sovaĝa dezerto de Nigra Maro, la pelaga⁴ patrino deponis la senmortan animon de la mortinta Aĥilo sur

tradukis Vasil Kadifeli el Turkio

la blankaj rokoj de la insulo kaj revenis al Trojo por ĉeesti la entombigon. Estis la deka jaro de la Troja Milito.

Miloj da mevoj, marbirdoj kaj migrantaj birdoj, venantaj el la elfluejo de la Danubo rivero, kaj la estuaro de la Dnestro⁵ rivero, el la golfo de Dnepra⁶ rivero aŭ el la malprofundaĵoj en la nordokcidento de Krimeo, haltas meze de la granda maro por ripozi sur la rokoj de tiu insulo, nomita Lefki. "Ili estas la kunuloj de Aĥilo," diris iam la maristoj. [...]



¹ Helesponto, la Dardaneloj, la markolo inter la Marmora kaj la Egea maroj

² Propontiso, La Marmora maro

³ Bosporo, la markolo de Istanbulo inter la Marmora kaj Nigra maroj

⁴ pelago, vivulo de la akvomaso de maro aŭ de lago

⁵ Dnestro, Rivero, fluanta de Karpatoj ĝis la Nigra Maro

⁶ Dnepro, Rivero, fluanta de Rusio ĝis la Nigra Maro

Fonto: <https://www.kathimerini.gr/culture/books/561871663/ti-schesi-echei-to-fidonisi-me-ton-achillea/>



5>> transcendos sian biologian ekzistaĵon, kiel diris Kurzweil? Ĉu la homo plu vivos kiel ekzistaĵo? Kvazaŭ ĉio estas direktita al ia estonteco izolita de aliaj organoj kaj funkcioj de la korpo por vivi en la cerbo. Ĉi tio ne estas pesimisma antaŭdiro, sed la ŝanĝoj pensigas min pri tio. Mi ne vidas ĝin kiel katastrofon, tamen ĝi ŝajnas al mi antipatia.



Aliflanke, se ni konsideras la "kadrojn", kiuj havis magian efikon tra la homa historio; temploj, sanktaj kaj sekularaj libroj, bildoj ktp, ĉi tiu rezulto ne estas surprizo. La homo ankoraŭ serĉas magion kaj senmortecon kaj transcedecon de la materialo. Li volas flugi en kadroj similaj al la magia preĝtapiŝo de Sinbad. Kiom ajn novaj kaj grandiozaj la ciferecaj novigoj povas ŝajni al la homoj de nia epoko, ili ĉiuj estas la produkto de mitologio, malnovaj rakontoj, fabeloj, seancoj pri alvoko de spiritoj, komunikado kun la ĉielo kaj tero, kaj arboj kaj bestoj en la arbaro, kaj volo atingi ilian sekreton.

La kinaj kaj teatraj kadroj, kiujn mi komparas, estas ankaŭ infanoj de miljaraj rakontoj. Tiu ĉi materia sfero ne sufiĉis por la homa formo. Por forigi la premon de la ĉiutaga vivo, li ludis ludojn, kreis ombroludojn, imitis la naturon ktp.

Ni venu al la arto de ago en ambaŭ kadroj! La kinoaktoro ne povas agi tiel grande, kiel en la teatro. La direktoro enprizonigas lin en la kadro de la kamerao. "Ne tro levu la brovon! Rigardu iomete maldekstren! Ridetu!" ktp... La sama interveno ankaŭ okazas en la uzado de lia voĉo.

Vi povas paroli laŭte en la teatro, por ke via voĉo atingu la publikon. Sed, la mikrofonoj en kineja filmado estas tiel potencaj, ke la laŭta sono preskaŭ eksplodas en la orelojn de la teknikistoj kaj la direktoro. Eĉ se la aktoro krias en la scenoj de kverelo kaj perforto, la nivelo de la sono estas ĝustigita poste en la studio.

Kiam vi iras sur la scenejon en la teatro, vi spertas viajn emociojn organike en du-hora teatraĵo de komenco ĝis la fino. Ĉar ekzistas ia linio de evoluo. En kinofilmado, la aktoro ne havas tian ŝancon. La filmado ofte ne estas filmitaj konforme al la linio de enkonduko - evoluo - konkludo de la manuskripto. Estas malsamaj kialoj, kiuj influas la tagojn kaj scenojn de filmado.

Ekzemple, pro vetercirkonstancoj, la unuaj scenoj de la filmo povas esti prokrastitaj al pli posta tempo, kaj la komencaj scenoj povas esti filmitaj en la lastaj tagoj. Kaj ĉar la aktoroj ludas pecon post pecon, sekvencon post sekvencon, necesas lerteco por kapti la ĝustajn emociojn.

Antaŭ la kino-aktoro ne estas homamaso, kiel la spektantaro, kiu donas emocijn kaj energion. Kontraŭ li estas la direktoro, la direktoro de fotarto, la scenejlaboristoj kaj eble kelkaj liaj aktorpartneroj. Ĉar ekzistas neniu "organika" medio en la teatro, la aktoroj devas montri sian kapablon en moment-kadroj. Estas malfacile transdoni emocijn en tiaj mallongaj momentoj.



La filmo estas filmita en pluraj lokoj aŭ en unu loko, kaj ĝia fina formo estas donita en la studio pere de redaktado, miksado, diversaj efikoj, ktp. Kontraŭe en la teatro la ludo estas provita sur la scenejo kaj prenas sian finan formon sur la scenejo. Krom dum turneoj, ĝi ĉiam estas ludita sur la sama scenejo. La rakonto ne eskapas el la manoj de la aktoro, kiel en la kinejo. Ĝi estas rekonstruita vive ĉiujvespere antaŭ la okuloj de la spektantaro. Filmo signifas momentoj enkaptitaj en kvadratoj. Ĝis nun, neniu aktoro eliris el la ekrano kaj eniris la spektantaro tiel, kiel en "La Purpura Rozo de Kairo" (filmo de Woody Allen).

Ambaŭ artoj kondukas nin el la kvadratoj de la limigita loko kaj spaco al nia propra imaga mondo. La ludo aŭ filmo montrita fajrigas nian imagpovon, kaj ni vagas inter la bildoj, kiuj postrestis el la spektado kaj la revoj, kiujn ni kreis.

De teatro ĝis kino; la vojaĝo de la spektantaro, la aktoro, la reĝisoro, la dramisto, la manuskriptisto kaj la tuta teamo daŭris kun vidaj rakontoj. Kio okazos en la proksima estonteco estas nekonata...

Konuralp Sunal

Büyükkada – Istanbul, Turkio

12 Majo 2022

- La malsupreniro de la eteraj komunumoj
sur la solidiĝantan planedon -

Mi ja diris al vi pri ĉiaj formoj; kaj estis daŭre luktado inter la linio-rektoj kaj cirkloj, elipsoj, punktoj; en tempo, kiun multaj sablohorloĝoj ne povus mezuri, ĉi tiu lukto estis kaŝita inter la solidiĝantaj aĵoj. La formoj, kelkaj el la lumaj korpoj, malsupreniris. Tiuj, kiuj ne malsupreniris, daŭris sian ekzistadon en la spaco. La grundo estis formita kiel jene: Multaj fajro-globoj kaj flamo-ondoj dancis unu kun la alia en la spaco. Ili amoradis kaj enmiksiĝis unu kun la alia. Flamo naskis flamon, kaj fine ĉiuj unuopaj flamoj fariĝis unu kaj naskis Flamo-Patrinon. La Flama-Patrinon, kiu estis granda kiel la paralelaj universoj. Iam ŝi malvarmumis, ŝi ekstremis kaj malvarmiĝis. Dum ŝi malvarmiĝis tera formoj formiĝis sur ĝi. Gluecaj vitoj malkiel de la hodiaŭaj, bestoj malkiel de la hodiaŭaj, fruktoj kaj plantoj malkiel de la hodiaŭaj formiĝis samtempe.

Ĉu vi demandas pri akvo? Iam iu stelo falis meze de la solidiĝinta tero. Ĝi eniris ĝis la fundo de la planedo, t.e. la Tera Vordonisi. La stelo estis senfina fonto de akvo. Ĝi fariĝis akvo ĉe la fundo kaj ŝprucis supren, do la solida planedo estis kovrita per akvo. En diversaj lokoj de la Tera Vordonisi, la grundo trapikigis kaj arboj kreskis el ili. Sed ĉi tiuj estis envolvitaj arboj. Alivorte, du apartaj arboj, kiuj kreskis el la sama radiko, ĉirkaŭvolvitaj unu sur la alia. Ili senĉese ĝemis kaj karesis unu la alian. Tiuj estis la unuaj humanoidaj inaj kaj viraj estaĵoj de la solida planedo. Ili amoradis libere kaj nature sur ĝi dum tre longa tempo.

Iutage, vaganta lumlinio dividis ilin al du, ĉiujn, unu post la alia. Tiel la viraj kaj inaj estaĵoj disiĝis. Iliaj radikoj putris, ili forgesis siajn pasintan amon. De tiam ili daŭre babiladis pri amo dum jarcentoj, ne povante reestabli siajn radikojn.

La aliaj Tera Vordonisi estaĵoj tiam ne sekskuniĝis por reproduktiĝi. Ĉiu estaĵo naskis novan estaĵon el si mem, kiam venis la tempo de ilia morto. Ili daŭrigis siajn specojn tiel renovigante.

Ili ĉiuj estis el la luma familio. Ĉu planto, ĉu besto, ĉu humanoido; ĉies esenco estis lumo.

La pioniraj inaj kaj viraj estaĵoj formis la Ligon de Senfina Radieco. Kiam la morto-tempo de humanoidoj venis ili dancis por sendi tiujn, kiuj mortis al ties esenco, t.e. al la maso de lumo en la spaco. En ĉi tiuj fruaj tagoj de la Tera Vordonisi, morto ne estis io timinda, ĝi signifis la dissolviĝon de la korpo por fariĝi lumo denove.

La sonoj kiujn ili eligis dum tiu dancceremonio

signifis:

*"Morto naskiĝo,
Naskiĝo morto,
Korpo gastiganto
Fariĝos pura
Rigardu al la lumo
Rigardu al la lumo"*



lun tagon, la Kolosa Nigra Truo, aŭ kiel la prauloj nomis ĝin la Terura Glutanto, absorbis la korpajn lumojn, kaj la humanoidoj ne povis plu atingi la lumon kaj komencis esti englutitaj de ĉi tiu malhela kirilaĵo. Tiel komenciĝis la timo pri morto... pro perdo de lumo... La timo de la humanigitaj estaĵoj en la periodoj de la unua civilizo sur Vordonisi ankaŭ devenas el tiu okazaĵo.

Sed ne ĉiuj cedis al timo entute. La netima frua ekzemplo ankaŭ fariĝis gvidilo dum generacioj. Tiu estis Ragyogás, kiu estis rajdanta fiŝon de lumo kaj surfis super la nigraj truoj kaj glutaĵoj. Lian bravecon li prenis de siaj neelĉerpeblaj lumo kaj brilo. Ĝi estis revenigante tiujn, kies lumo estis englutita de nigraj truoj, reen al la senfina lummaso. Tiel li turnis iliajn malluman morton en luman morton. Ĝi ebligis al la humanoidoj vivi en la senfina rondo. Ragyogás estis legendo dum jarcentoj, kaj statuoj estis ĉizitaj je lia nomo post kiam li foriris al la Granda Maro de Lumo en la plej altaj niveloj de la universo. Tiuj, kiuj estis ligitaj al li, ne cedis al la mallumo, kaj tiuj, kiuj lin forgesis, perdis sian lumon.

La Vordonisianoj, kiuj estis liaj humanoidaj nepoj, kiu multe pli poste prenis la homan formon, kantis kanton por li:

*"Ragyogás, estas la nevenkito de mallumo.
Vaganto sur sia fiŝo de lumo en senfinco,
Rigardas el la Granda Maro de Lumo,
Niajn animojn ronĝitajn de timo.
Li estas tiu, kiu gvidas nin,
Foriganto de nigra glutaĵo!"*

La vivo aventuro de la Vordonisianoj daŭris de iliaj eteraj prapatroj, malsupren sur la planedo, kaj de tie reen supren al la luma esenco.

Kaj estis ankaŭ Elnyelő, kiu...

Konuralp Sunal

25-a de majo 2022

Büyükkada, İstanbul, Turkio



Solvo de la krucvortenigmo

ES	TI	ĜO		KRE	O	DA	TO
PE	NO		E	DI	PA		MAT
RAN		I	NER	TO		PEN	SU
TO	PO	LO	GL-O		A	DI	PO

Vortoj de Kep Enderby

Eble naive, tamen permesu al aŭstraliano alternative proponi, ke la homaro, inkluzive de eŭropanoj, ja havas kapablon superi mallaŭdindajn sentojn kaj prijuĝojn. Lastatempe, kaj hazarde, kaj ne rekte rilate al la situacio en Eŭropo, mi havis okazon respondi al artikolo aperinta (angle, kompreneble) en gazeto „Aŭstralia Racionalisto“. La aŭtoro argumentis, ke Aŭstralio tro involviĝis en t.n. tutmondiĝo, kontraŭ kiu, estanta kapitalisma, nepras lukti.

Atencoj

Mi replikis, ke la mondo, se ne tuj, devos sufiĉe maturiĝi por havigi al si mondregistaron, mondfederacion aŭ almenaŭ mondkonfederacion, por ke la nuntempa militsistemo estu anstataŭata de pacosistemo; krome, ke mondregistaro necesas por estri interdependan mondekonomion, eviti monskalan ekologian katastrofon, juste leĝdoni por regionoj de la mondo ekster la regado de landaj registaroj, juste kaj efike prizorgi seriozajn atencojn kontraŭ homaj rajtoj kaj aliaj internaciaj krimoj, kaj fine por pli subteni kaj pli prosperigi senton de monda komunumeco.

Alivorte: la homaro kreu por si novan senton de identeco: identeco, kiu superos triban aŭ nacian senton kaj kiu estu tutmonda. Naciismaj sentoj, sentoj pri nacia fiero rilate al identeco, estas kerne malprogresemaj. Subtene al tio mi citus iujn verkojn el nia Esperanto-literaturo – verkojn, kiel Monda Federacio de la usonano Ronald Glossop (el kiu mi prunteprenis iujn el la vortoj supre uzataj).

Filizofio

Citindaj estas ankaŭ La universalismo, historio, ekonomio kaj filizofio de la franco Djemil Kessous; la diroj de la mondpensanto Thomas Payne (18-a jarcenta brit-devena usonano), kiu dum la tiama milito de la britaj kolonistoj en Nord-Ameriko kontraŭ la brita patrujo fiere deklaris sin esti „civitano de la mondo“. Inter aliaj memorindaj diraĵoj de Pejno estas „Mia lando estas la mondo kaj mia religio estas fari bonon“ kaj eble eĉ pli polemike, „Registaro, eĉ en sia plej bona stato, estas necesa malbono; en sia plej malbona stato, io netolerebla“.

La penoj de eŭropanoj forĵeti siajn malnovajn sentojn pri identeco, pri tio brakumi pli progresemajn ideojn, kiuj identigus ilin malpli kiel britojn, francojn,

germanojn, ktp, kaj pli kiel eŭropanojn, estas aplaŭdindaj. Mi deziras, tamen, ke tio estu nur unua paŝo al kreo de reala sento, kiel Zamenhof mem diris, ke identeco estu ne nacia sed homarana; ke iam aŭstralianoj, ĉinoj, japanoj, usonanoj, afrikanoj ktp estu nur homoj, anoj de la homara raso, strebantaj plej efike protekti kaj progresigi la planedon kaj homaron. Mi argumentas, ke pli kaj pli la historio pruvas, ke nacioj estas nur „imagataj komunumoj“, kiel argumentis Benedict Anderson en sia libro Imagined Communities (Imagataj Komunumoj).



Harmonia homaro

Notindaj por esperantistoj estas la vortoj de Zamenhof en letero de la 30a de junio 1914, indikantaj lian rifuzon partopreni starigon de Tutmonda Esperantista-Hebrea Asocio. Zamenhof skribis: „Mi mem bedaŭrinde devas stari flanke de la afero, ĉar laŭ miaj konvinkoj, mi estas homarano, kaj ne povas ligi min kun celado kaj idealoj de speciala gento aŭ religio. Mi estas profunde konvinkita, ke ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon, kaj ke la celado de ĉiuj homoj devus esti: krei harmonian homaron. (Nacionalismo) prezentas eraran rondon de malfeliĉoj, el kiuj la homaro neniam eliros, se ĉiu el ni ne oferos sian grupan memamon kaj ne penos strariĝi sur grundo tute neŭtrala“.

Oni devas agnoski, ke en la nuntempa mondo ekzistas fortoj, kiuj kontraŭas progresigajn ideojn tiajn. Formale, laŭ internacia juro, pro antaŭaj kaj nuntempaj imperiaj rilatoj, la mondo dividiĝas en preskaŭ 200 laŭdire egalaj kaj suverenaj ŝtatoj: reale la vero estas alia. La plimulto, kiam cirkonstancoj necesigas tion, cedas malegale al pli fortaj hegemoniaj ŝtatoj, ĉefe, nuntempe, al la plej forta ŝtato Usono.

Tamen – ĉu tio, kion mi asertas, ja validas? Aŭ ĉu ĝi prezentas falsan, eventuale utopian bildon? Mi bonvenigus leganto-reagojn (tamen bv. koncizajn) cele al tiutema debato.

Fonto: Legolibreto 2 de Jindřiška Drahotova

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI

www.CDELI.org

RETEJO DE LA ASOCIO AMIKOJ DE CDELI

TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:	Kodo:
Esperanto (+turka)	Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds